



## ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

- MUZIKO:** Eduardo Grieg (NORVEGUJO), de Fino O. Prudent.
- SCIENCJOJ:** Scienca Kroniko, de M. Finot (FRANCUJO). Ulisse Aldrovandi, de A. Tellini (ITALUJO). Claes Adelköld, de P. Nylén (SVEDUJO).
- ĈIULANDAJ KUTIMOJ:** La Kristnaska ŝtupo, el « Memoroj kaj Rakontoj » de Frédéric Mistral (PROVENCO), tradukita de A. Montrosier.
- SPORTOJ:** La vintro en la alta montaro: de Th. Hopf (SVISUJO).
- VIRINA PAĜO:** La Modo, de Roksano.
- FELIETONO:** Duonsurda, komedio de Roksano (FRANCUJO).
- ĈIULANDA LITERATURO:** Kristnaska rakonto pri blinduloj, de D<sup>ro</sup> R. I. Kronbauer kaj V. Riegel (BOHEMUJO).
- PRI ESPERANTO:** Ĉirkaŭ « la kvara », de Ch. Barthel kaj Sergius Winkelmann (GERMANUJO). — Nia ĉiujara festo, de O. Simon (AŬSTRUJO). — E. V. K., de anino (ANGLUJO). — Bibliografio.
- MIKSAĴOJ:** Konkurso, de Ch. Brunet.



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.).  
La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro:

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).



« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.


## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonon aŭ reabonon senpere pro la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.**

Urgaj sciigoj; REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la tuj elironta N<sup>o</sup>.

### ASP KANDELLANTERNOJ por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,  
Opportuna, Pura,  
Neestingebla  
en Ventego,  
Funkciadas bonege  
nur kiam oni uzas  
la por ĝi

**Konstruitajn ASP-Kandelojn**  
145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75


18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE

**O. F. ASP, Kopenhague.  
DANUJO.**

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.  
Generala Agento :  
S<sup>ro</sup> G. RUTTER, 30, Red  
Lion Squar, LONDON.



POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

## Vera Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de  
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

### Respondoj.

**J. Rossell' (Mallorca).** — Sinceran dankon, sed ni ne enpresas versojn.

**Por la blinduloj.** — Vendo de tre ĉarmaj 4-foliaj trifolioj gluitaj sur kartetojn de *Fino Allin*. (Aliaj estis donataj al *Fino Z. d'Her* en Kembrigo). 3 fr.

**S<sup>ro</sup> P. P. Fewings (Aŭstralio).** — Certe represo de malnovaj verkoj elvenditaj estas dezirinda. Tio koncernas la eldonajn firmojn.

**S<sup>roj</sup> de Bann, Ruŝkin, Stevens,** turnu vin senpere al la firmo *Fortin Patro kaj Filo*.

**S<sup>roj</sup> R. Rajezy, Romein kaj Wynandts, Southcombe, Fize.** — Koran dankon por viaj sendaĵoj.

Ni respondas TIE ĈI al la leteroj akompanataj de internacia responda kupono; PRIVATE al la leteroj akomp. de du internaciaj kuponoj.

### Rekomendataj firmoj.

**ESPERANTA RESTORACIO** 80, Rue Mazarine, PARIS 6<sup>e</sup>.  
Bona familia kuirado je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

**ANONCAGENTO.** C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. *Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».*

### REABONO.

Niaj legantoj, kies abono finiĝis, ou finiĝas jarfine bonvolu TUD reaboni.

## L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S<sup>ro</sup> Emilo Gasse, 105 rue du Lycée, Le Havre (France).

### TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	}	ANONCOJ :	{ Por unu anonco :	0 fr. 75 ĉiulinie.
		(33 literoj)	{ Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
			{ Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
		REKLAMOJ (50 literoj) :	2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 om. kv.)

1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco :	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ :	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.
Por la tuta jaro :	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino del' monato.

#### NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enbavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-karaj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj; pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havigi rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi: ni rekomendas ankaŭ tiujn anoncetojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

### FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MEDITERRANÉE.

VINTRO 1907-1908.

#### Rilatoj rapidaj inter Paris kaj Italujo.

**Per Simpiono:** per la luksa vagonaro « Simplon-Ekspres » (L-V, R-V), deiro de Paris P. L. M., lunde, merkredo, sabate, je 8 h. 05 vesp., de 1<sup>a</sup> 4<sup>a</sup> de nov. ĝis la 29<sup>a</sup> de feb.; — kaj ĉiutage post la 1<sup>a</sup> de marto. Paris-Milano en 15 h. London-Milano en 24 h. 30.

**Per Monto-Cenis:** per la luksa vagonaro « Paris-Romo » (L-V, R-V), deiro de Paris P. L. M., marde, ĵaŭde, sabate (3 dec.-19 majo) : 11 h. 20 mat.; deiro de Komo, lunde, merkredo, sabate (7 dec.-13 majo) : 1 h. 40 vesp. (H. E. C.). — *Nombro da lokoj limigita.*

#### Rilatoj rapidaj inter Paris kaj la Lazura Marbordo.

**Tage:** per la « Côte d'Azur-Rapide » (vagonaroj 15 kaj 16) (1<sup>a</sup> kl.; S-L; S-V; R-V) — Paris-Nice en 13 h. 50.

**Nokte:** a) per la vagonaroj « rapidegaj » 17 k. 18 (1<sup>a</sup> kl.; L-V; S-L; k. Salonoj kun 2 litoj kompletaj) Paris-Nice en 24 h.

b) per la luksa vagonaro (L. 21-L. 22) « Calais-Méditerranée » L-V; R.) Paris-Nice en 15 h. — London-Nice en 24 h.

c) per la rapidaj vagonaroj 7 kaj 10 (1<sup>a</sup> kl. L-V; S-L.) Paris-Nice en 17 h. — London-Nice en 27 h.

*Nombro de lokoj limigita.* — Por pluj sciigoj esploru la specialajn afiŝojn.



## Eduardo Grieg.

Dum mi estas provanta difini la specialan ekscitecon kreitan en mi per la aŭdo de muzikpaĝo de Grieg, revenas en mian memoron tiu penso de Tolstoj: « Mi kredas, diris la rusa eminentulo, ke ĉia nacieco uzas malsimilajn rimedojn por esprimi, artece, la idealon komunan, kaj ke tial ni sentas ĝuon alian, trovante, tra la alilandaj verkistoj, nian idealon tradukitan laŭ nova kaj neatendita maniero. »

Vera pri la literatureco, kiel tiu juĝo estas tia ankoraŭ pli pri la muzikeco!

Ja, estas malofte, kiam ni legas libron alilandan alie ol per traduko, kiu elprenis el ĝi, devige kaj almenaŭ, la delikatan guston, la proprajojn de ĝia originala lingvo, kiun la talento de l'aŭtoro, eble, uzis kiel plibeligan rimedon. La muzika verko ne timas tiun senflorigon. Kiel ĝi estas kreita, tiel ĝi alvenas al ni, kaj de ĝi ni povas spiri la tutan parfumon.

Sola, cetere, ĝi estas kapabla traduki tiun elementon malmaterialan, flugilhavan de l' animo de la individuoj aŭ de la nacioj, kiun la artoj aliaj ol muziko, — la plej spirita el la artoj — ne povas vesti per formo konkreta.

Kaj se ia popolo havas, pli ol aliaj, en sia animo, tiujn pensojn kaj sentojn, kiujn la delikateco, la malprecizeco, la forkureco de la sonoj havas la privilegion propran esprimi kaj elvoki, ĝia melodio havos, pli ol alia, la potencon, alkonduki nin al la bordo de la senlimo, kaj tie kormovi nin per impresoj misteraj.

Estas stranga popolo, tiu norvega popolo, liverita de duoncentjaro al malrapida evolucio, dum kiu moliĝas ĝia malĝentileco kaj perforteco primitivaj, je l' influo de la civilizacio iranta. Stranga popolo, havanta neprecizajn, malsimplajn, moveblegajn, sovaĝajn, flamajn ekscitecojn — kaj Grieg estas ĝia liro:

Gajeco sprita kaj supra, kiun subita maltrankvileco tranĉas; — nek varmeco nek forteco, ne pli

ol la skandinava suno tra la nebulegoj fjordaj; — melankolio maldolĉa kaj morbida trapasata de saltoj perfortaj, tiaj, kiajn havas la krudaj naturoj de la norvegaj kamparanoj, paŝtistoj aŭ fiŝkaptistoj ĉe la marbordo; — io naiva kaj pura, apud io malvirta kaj volupta. Tiel estas la aĵo nepre originala kaj fruktoporta de la inspiroj de Eduardo Grieg.

Bergen estis lia naskurbo (la 15<sup>an</sup> de Junio 1843), kaj oni devas atenti, en la artista edukiteco de la infano, pri la influo ekzercita sur lia movebla animo de la vizado de tiu ĉi parto de Norvegujo, speciale grandioza, kaj ĉarma, kaj sovaĝe malĝoja.

Lia familio, cetere, estis esence muzikema. Ĉiuj Grieg kaj Hagerup (nomo de lia familio patrino) muzikis por kontentigi pli ol guston, sed postulon de propra naturo.


De lia patrino, eminenta fortepianistino, la juna Grieg ricevis siajn unuajn lecionojn, kaj elmontris, sub tiu dolĉa kaj fervora direktado, muzikajn kapablojn eksterordinarajn: en sia naŭa jaro, li provis verki muzikajojn.

Laŭ la konsiloj de Ole Bull, fama muzikverkisto norvega, li estis sendata ĉe la konservatorio de Leipzig. Sed la studoj, kiujn li faris tie, kvankam fruktodonaj muzikteorie, ne klerigis la junan artiston pri liaj kreaĵoj: oni retrovas klare videble, tra la verkoj skribitaj je tiu epoko, memorajojn de Chopin, Schumann, Wagner (1858-62).

Sed en 1863, Grieg, en Kopenhago, renkontas Gode'ou, kaj, en Kristanio, Nordraak'ou, kaj tiuj majstroj malkaŝas lin al li mem.

Li posedas la amon al la popolaj kantoj, la esprimon vivan de la animo de sia lando; li estos ĝia tradukisto, kaj diros ĝian misteran belecon.

Tri vojaĝoj en Italujon (1865-69), kie, dum la vintro de 1870, li renkontis la gloran Listzt, en Komo; lia restado en Kopenhago, kie li estis fortepianprofesoro; lia edziĝo kun lia kuzino Nina Hagerup, kantistino talenta, kiu esprimis liajn melodiojn



BERGEN, LA NASKURBO DE GRIEG.

inteligente kaj kormove ; lia reveno en Bergen'on, en lian loĝejon « Troidhaugen » (1885) estas la ĉefaj okazintaĵoj de lia vivo. Ĝin la morto tranĉis tro frue, la 9<sup>an</sup> de l' ĵus pasinta Septembro, trovante lin submetatan, dirantan al lia edzino : « Jes, jes, kiam tiel estos !... »

Dum siaj tri- aŭ kvardek laborjaroj, Eduardo Grieg ne elfaris tre multe da verkoj : sesdek proksimume ; sed inter ili almenaŭ dekkvin havas superan valoron kaj estas indaj, ke oni metu ilin apud la klasikajn majstroverkojn.

Oni miros pri la malmega libereco de ritmo, kiun li donis al la sonato ; oni sentos la karakterizan ĉarmon de liaj « Norvegaj popolaj dancoj » tradukitaj laŭ sprita kaj sobra gusto, kaj kompreno intima de la nacia arto ; oni aplaudos en lia opero « *Peer Gynt* », komponiciita pri poemo de Ibsen, kelkajn

paĝojn mirindajn. Sed en siaj « *Lieder* » (Kantoj) kaj siaj voĉaj komponicioj, li estos pleje komprenata kaj amata.

Mallongaj motivoj pri naiva temo eltirita el ia poeto skandinava : Andersen, Bjornson, Ibsen, aŭ, kaj precipe, el Henri Heine, en kiuj la rekantaĵo esprimas nelongan melankolion aŭ malseriozan ridon. Multaj el tiuj romancoj estas ĉe ĉiuj lipoj, de Stockholmo ĝis Kopenhago : *Min lille Fugl* (la birdo de amo) ; *Solveigs sang* (la kanto de Solveig) ; *Ases dod* (la morto de Ass) ; *Den sidste vaar* (La lasta printempo), la verketo preferata de l'aŭtoro, k. t. p.

Nepre melodiisto, Grieg havis propran karakteron, ĉar li eniĝis en la revon maltrankvilan kaj profundan de la norvega animo, kaj de ĝi estis la artista kaj sincera eho.

ODILINO PRUDENT.



## NIA ĈIUJARA FESTO. — EL LETERO DE S<sup>RO</sup> OTTO SIMON.

« ..... Nia majstro proponas :

A. la 17<sup>an</sup> de Decembro (dato de la unua festo esperantista en la jaro 1878).

B. la tagon de la printempa (por la suda hemisfero : aŭtuna) tagnoktegalco, kiu povus servi kiel simbolo al la neŭtraleco por la tuta homaro.

La majstro aldonas, ke tiu provizora opinio ne havu ian influon ĉe la decido.

Al la dato de la 17<sup>a</sup> de Decembro aliĝas Sroj Codorniu kaj Pollen. Al la dato de la 21<sup>a</sup> de Marto, Sroj Montrosier kaj Simon.

Sino Hankel timas, ke tiuj datoj estus tro proksimaj al la Kristnaska, kelkafoje al la Paska festoj ; ŝi kaj Sro Tabenski denove proponas la 21<sup>an</sup> de Julio, jam proponitan de Sro Tabenski en « *Tra la Mondo* » ..... »

Pri tiu lasta propono, kies deveno oni konas, Sro O. Simon aldonas

« .....laŭ la lastaj esploroj de Dro Zamenhof montriĝis, ke :

1. La dato, en kiu la unua libro pri Esperanto ricevis la cenzuran permeson, estis ne la 20<sup>a</sup> de Julio, sed la 2<sup>a</sup> de Junio (21<sup>a</sup> de Majo laŭ la rusa kalendaro) ;

2. El ĉiuj aliaj datoj koncernantaj la komencan historion de Esperanto, kun plena precizeco estas konata nur la dato de la 17<sup>a</sup> de Decembro 1878. »

Kaj li finas petante, kiel eble plej frue, la opinion de la interesatoj.

Antaŭ ol lasi tiun temon, mi permesos al mi kelkajn privortojn. Nia festo devas esti festo utila por la propagando : 1<sup>o</sup>, al tirante al ni la atenton de la gazetaro ; 2<sup>o</sup>, havigante al Esperanto novajn adeptojn.

Nu, nia jara agado povas esti dividata je 2 partoj : la unua, de Oktobro-Novembro ĝis Marto, proksimume ; la dua de Marto ĝis Junio-Julio. Por prepari la unuan, tute sufiĉas la bruo farata ĉirkaŭ la kongreso en kaj ekster la gazetaro, niaj aŭtunaj paroladoj (printempaj por la suda hemisfero) en kiuj la kongreso havas gravan lokon. Saman rolon ludus, por prepari la duan agadon, nia tagnoktegalca festo. Tiu dato havas specialan signifon por la *Esperant*'istoj : ĝi estas la komenco de la printempo, t. e. de la sezono, dum kiu estas permesataj ĉiuj *esperoj* al riĉa somera rikolto. Nu, la penadoj por la semado, de la malnovaj adeptoj — refervorigitaj de la festo, kaj de la novaj — entuziasmitaj de l' spektaklo de siaj antaŭuloj komuniantaj en la sankta interna ideo de Esperanto, havigus bonan rikolton, preparus inde la jaran triumfon de Esperanto, t. e. nia ĉiujara kongreso.

Ni liveras tiujn pripensojn al la ekzameno de la esperantistaj grupoj, — la ĉefaj interesatoj, ĉar izoluloj ne povas organizi feston — instigante, ke ili sendu kiel eble plej frue la rezultaton de sia esploro al Sro O. Simon, Vieno VIII, *Josephstädterstrasse*, 66, *Aŭstrujo*.

A. MONTROSIER.

La Simiohomo (Pithecanthropus).

Oni memoras, ke, antaŭ kelkaj jaroj, misio estis sendata al Java, por eltrovi de la nuna homo la prapatron, kies pecetojn el ostaro estis trovinta kuracisto holanda, tio estas, fine, por trovi la montron definitivan kaj netuŝebian de realeco de la teorio evolucia, elfarita de naturisto Lamarck, kaj reeldonita post 50 jaroj de Darwin, kiu ĝin triumfigis fine, kaj iĝis per tio fama.

Kelkaj skeptikuloj diras kelkafoje, ke tiu teorio konsistas el tio, ke homo devenas el simio. Sendube, tio estus nek hontiga, nek humiliga: pli bone estas, esti simio plibonigita, ol anĝelo malplibonigita. Sed tio estas malmulte kredinda: en ĉiuj geologiaj tavoloj, eĉ en la plej maljunaj, oni renkontas samtempe ostojn de simioj kun postsignoj de homoj; do, preskaŭ ĉie, homo kaj simio estas samtempaj.

Tamen, nenia besto estas, ne nur pro la ĝenerala vidiĝo, sed ankaŭ pro ordo anatomia, pro irado, pro cerbo, eĉ pro moroj, apetitoj, pasioj, pli proksima al homo, ol simio. Nenio estas pli simila al juna simio, ol juna homo. Kiam ili pli kaj pli kreskas, la diferenco pli kaj pli grandigas, sed ne sufiĉe, por ke estu granda malsimileco inter sovaĝulo, homo fosaĵa, troglodito de la periodo ŝtona, kaj simioj, eĉ la plej grandaj.

Oni komprenas cetere, ke la nigrujoj diras, ke simio estas nur homo, tiel ruza, ke li ne volas paroli, por ke oni ne devigu, ke li laboru, kaj ke Linné ne timis meti ĝin apud homon, en la speco de *primatoj*, malgraŭ la skandalo de siaj samtempuloj.

Tiu konata teorio efektive kaŭzis kaj kaŭzas ankoraŭ multajn pasiajn kontraŭbatalojn inter la anoj de la kreado Dia de naturo kaj tiuj de la nova teorio. Tiuj ĉi akceptas, ke la ekzisto de aĵoj kaj estaĵoj rezultas, ne de ago subita kaj vola de kreinto tiranta ĉion el nenio, sed reale estas rezultato de malrapida kaj sinsekva serio da aliformiĝoj de materio. Tiu ĉi, kiel sciigas abato Moreux en sia fama verko « Suna problemo » kondensigis unue, kaj faris nebulaĵojn, poste astrojn, sur kiuj vivo aperis, kiam la kondiĉoj de varmeco, atmosfero, malsekeco iĝis ĝin povebla, kaj iom post iom aliformiĝis kaj sangiĝis, por iĝi, post sen nombraj stadioj, kiujn montras al ni la studioj geologiaj, tia, kiam ni ĝin konas.

Kia ajn interesa ĝi estas, tiu teorio havas ankoraŭ kontraŭbatalantojn; sed, krom maloftaj esceptoj, tiuj ĉi ne estas malpacigemaj: ili akceptas ĝin por ĉiuj estaĵoj, escepte por homo, kaj, por tion klarigi, kaj rifuzi al homo tion, kion ili akceptas por bestoj kaj kreskaĵoj, ili atentigas al tio: por bestoj kaj kreskaĵoj, oni renkontas, almenaŭ elfosaĵe, formojn de transiro, kiuj ebligas, ke oni vidu la diversajn fazojn de evolucio de tiuj estaĵoj. Dum, la homon koncernante, oni nenion saman konas. Inter grandaj simioj nunaj (goriloj, ŝimpanzoj, k. t. p.) kaj homo, estas vere grandega manko, tiel grandega, ke nenia naturisto povas certigi, ke la unuaj estas prapatra formo de la duaj.

Tial, oni facile komprenas, kiel interese oni sciigis la eltrovon faritan de doktoro Dubois, en Java, en teraroj de tria epoko, — t. e. pli maljunaj ol ĉiu el tiuj, kie oni ĝis nun renkontis ostarojn homajn, — de kelkaj pecoj de ostoj, konsistantaj el femurosto, du dentoj vangaj, kaj supraĵo de kranio, apartenantaj al estaĵo, kiu estas nek simio, nek homo, kaj al kiu oni donis la nomon *Pithecanthropus*. Tio estas sendube malmulte, sed sufiĉas por refari, laŭ la metodo de Cuvier, la tutan ostaron de tiu estaĵo.

Tiu eltrovaĵo estis pravigo de certigoj jam maljunaj de kelkaj naturistoj. celantaj la ekzistadon, en teroj de tria epoko, se ne de homo, almenaŭ de estaĵo tre simila al ĝi. Ekzemple abato Bourgeois trovis en 1867, en Francujo, silikaĵojn tranĉitajn; kaj ankaŭ Carlos Ribeira, en 1871, en Portugalujo; G. Belluci, el Perouse, k. t. p.

El studioj tre gravaj, faritaj per tiuj pecoj, S<sup>o</sup> Manouvrier certigis, ke ili apartenas al « estaĵo meza inter homo normala malsupra kaj simioj antropoidoj » (Revue de l'Ecole d'Anthropologie, V. 72). La enhavo de ĝia kranio (1000 cm<sup>3</sup>) estas multe pli granda, ol tiu de gorilo, kaj oni povus observi ĝin, en raso homa, nur ĉe mikrocefalo (malgrandkapulo) aŭ ĉe idiotulo. Oni povas ĝin loki ĵus inter tiu de homo la plej malsupra de la raso de Neanderthal, kaj tiu de ĝibono, kiu loĝas en iaj regionoj de Azio, precipe en arbaroj de Malaisie. Kaj tio estas precipe interesa, kaj celas pruvi, ke la originlando de l' homaro estas lokota en tiuj regionoj, kiel oni ordinare pensas.

Aliaflanke, la dento estas simia, pli ol homa: kontraŭe, la femurosto ŝajnas preskaŭ homa: almenaŭ ĝi apartenas al dupiedulo, kutiminta, ne grimpi sur arboj, aŭ kuri sur 4 piedoj, kiel simio, sed stari ordinare, kaj marŝi sur la piedoj malantaŭaj. Kaj plie la observado de la malantaŭa plano de la kranio, lokita vertikale sur la vertebra kolono, certigas tute tiun ideon.

Post tiu eltrovo, dank' al malavareco de la amerikana riĉulo Vanderbilt, misio grava estis sendita al Java por serĉi aliajn ostojn de tiu prahomo, sed vane; kaj oni ne plu parolis pri tio. De kelkaj monatoj, tiujn elserĉojn oni rekomencis. Pro Klaatsch, eksplorante la nordon de Aŭstralio, renkontis en Port-Darwin, sur la bordoj de regionoj malmulte vizitataj, kaj kie la civilizacio ne estas granda, virinon sovaĝe vivantan: ŝi havas piedojn, per kiuj ŝi supreniras la arbojn kiel simio, kaj ŝi estas kapabla stari sur du piedoj; ŝi havas haŭton brunan, malmulte da haroj, ŝia vizaĝo estas tute senhara; ŝi nutras sin per ovoĵ, fruktoj kaj radikoj, loĝas en nestoj similaj al sovaĝaj dometoj. Ŝi konas la uzon de fajro, kvankam ŝi ne uzas ĝin, faras por si maldelikatajn ilojn per branĉoj de arboj aŭ ŝtonoj; tio alproksimigas ŝin al antropoido malbone konata, kiu loĝis en Eŭropo dum la tria epoko, kaj kiu lasis, kiel postsignojn, nur tranĉitajn silikojn. Ŝi eĉ konas iom la ornamaĵojn, ĉar ŝi ĉirkaŭas kelkafoje sian kolon per ĉirkaŭkolo el ruĝaj beroj trapikitaj de fleksebla herbo.

Serĉistoj de oro certigas eĉ, ke ili povis kapti kaj kelktempo konservi paron da tiuj bestoj, kiuj, laŭ ilia diro, uzis lingvaĵojn, kaj povis interparoli per vortaro malriĉa kaj unu-tona. Misio nova estos sendata por studii tie tiujn bestojn. Ĉu ili estas fine la tiom serĉita pitekanthropo, nia prapatro?

Nuna stato de la senfadena telegrafio.

La plibonigo de la nunaj aparatoj de senfadena telegrafio ebligis komunikadon inter Boston' kaj Skotlando, je pli ol 2000 kmj. Oni povas nete transsendi depeŝojn ĝis interspacoj pli grandaj ol 2000 kmj, la komunikadoj estas pli bonaj nokte ol tage. La posteno de Eiffelturo komunikadas ĉiusemajne kun Bizerto (1500 kmj) per tre simplaj aparatoj kaj forto de 8 H. P. Oni opinias, ke, kiam oni havos forton de 50 H. P., oni povos senpere korespondadi kun Ameriko.

— Jam de kelkaj jaroj, oni provis, en la angla armeo, uzi la senfadenan telegrafion, aranĝante kelkajn veturilojn de ordinara telegrafio, sur kies tegmento oni povis starigi maston cilindran altan je 5 aŭ 6 metroj: tiu alteco sufiĉas por ebligi la komunikadon inter la regimentoj de unu korpuso de armeo. Markiso de Solari, sekretario de Marconi, konstruadis veturilon, en kiu li loĝigas la aparatojn uzatajn sur ŝipoj: la mastoj konsistas el ŝtupetaroj malfaldeblaj, kiel tiuj de fajropumpistoj: ili ebligas, post malpli ol dek minutoj, komunikadigi du postenojn malproksimajn je 150 kmj; tion oni povas utilligi sur ordinara telegrafaj vojoj, kiam la komunikado estas interrompita, aŭ kiam malfacile estas starigi fadenojn, ekzemple en kolonioj.

— Oni scias, ke unu el la malutiloj de la senfadena telegrafio estas la mikso de ondoj. Du serioj da ondoj povas trairi unu la alian sen domaĝo; sed, ĉar sama ricevilo montras ilin samtempe, okazas konfuzo. La nuna ricevilo estas simila al okulo, kapabla distingigi ĉiujn kolorojn, de ruĝa ĝis viola, kaj kiu vidas, kiam oni ilin samtempe elsendas, nur ilian miksaĵon, t. e. blankan lumon. La problemo estas jena: trovi ricevilon, kiu distingos nur unu serion da ondoj, kiel okulo kiu distingos nur unu koloron. Fizikisto dana solvis tiun problemon, S<sup>o</sup> Poulsen, el Kopenhago, kun eraro de 2% proksimume: t. e. se aparato sendas ondojn longajn je 600 metroj, la ricevilo distingos ondojn longajn je 594-606 metroj; posteno fremda do konfuzos la depeŝojn, nur se ĝi sendos tiajn ondojn, kaj tio ordinare ne okazas. Oni uzas, ne plu la Hertzian rezonilon, t. e. fajreron, sed arkon elektran, apud kiu oni sendas fluon elektran; tiu arko brulas en hidrogeno aŭ lumiga gazo; la ofteco de ondoj estas multe pli granda: unu miliono ĉiusekunde.

Tiu eltrovo, sciigita dum la kongreso de Berlin, estos sendube plibonigita; eksperimentoj, komencitaj en junio 1905, permesis ke, inter miksaĵo de ondoj anglaj, germanaj, kaj aeraj, la ricevilo enskribu nur la radiogramojn de sia komunikanto.

S<sup>o</sup> Poulsen samtempe laboras la problemon de senfadena telefonio; laŭ *Eho Esperantista*, uzante ankaŭ la arkon elektran: efektive, la daŭro de fajrera oscilo (centmilono de sekundo) ne sufiĉas por redoni la parolan oscilon (miliono de sekundo), dum la osciladoj elsenditaj de la fadeno alligita al arko estas tute simetriaj. Se oni kunigas aerfadenon kun mikrofono, kiel ĉe telefono, oni influas, parolante en la mikrofonon, la osciladojn radiantajn el la aerfadeno, en ilia intenseco, laŭ la parolaj osciladoj. La ricevilo estas elemento elektrolita de Schlämilch, kies intenseco de fluo estas influata de osciladoj ricevitaj de elsendloko; la variado de oscilajo okazas en sama ritmo, kiel en la ricevilo, kaj oni povas aŭdi la samajn sonojn, kiuj estis parolataj en la mikrofono de la elsendaparato.

## El « Memoroj kaj Rakontoj »

de FRÉDÉRIC MISTRAL.

Niaj legantoj legos plezure la ĉarmajn ĉi subajn liniojn <sup>(1)</sup>, tradukitajn laŭ la delikataj memorskriboj de la granda Provenca verkisto Frederik Mistral, el kies verko ni jam donis eltranĉaĵojn antaŭ unu jaro.

Komparante tiun ĉi rakonton kun tiu tiel poezia de Fino Cederblad pri Kristnasko en Svedujo<sup>(2)</sup>, niaj legantoj vidos, ke landoj tremalsamaj havas la saman kulton por iuj festoj. Certe en multaj aliaj landoj Kristnasko estis kaj estas ankoraŭ kunvena okazo por la anoj de sama familio, disigitaj de la vivaj necesecoj. Ni ricevos plezure tiajn familiajn rakontojn.

Por mia patro, fidela al la antikvaj kutimoj, la antaŭvespero de Kristnasko estis la granda festo. Tiun ĉi tagon la terlaboristoj alvalpaŝis frumatene; al ĉiu el ili mia patrino donacis, en tuko, belan platan kukon faritan per oleo, radon el migdalkuko, provizon da sekigitaj figoj, fromaĝon el la brutaro, apian salaton kaj botelon da kuirita vino. Kaj iu ĉi tien, iu tien, la servistoj deiris, por « meti la ŝtipon en la fajron », en sian landon kaj en sian hejmon. En la *Mas* (*Sudfranca farmodomo*) restis nur la malfeliĉaj malsatmortuloj sen familio; kaj, iafaĵe, parencoj, ia maljuna fraŭlo ekzemple, alvenis nokte, dirante:

— Bonajn festojn! Ni venas, gekuzoj, meti la ŝtipon en la fajron kun vi.

Ĉiuj kune, ni iris ĝoje serĉi la « Kristnaskan ŝtipon », kiu — laŭ la tradicio — devis esti frukt-arbo. Ni ĝin alportis en la Mas'on, ĉiuj sinsekvantaj unu la alian, la plej maljuna ĝin tenanta ĉe unu ekstremaĵo, mi, la plej juna, ĉe l' alia; tri fojojn, ni rondiris ĝin en la kuirejo; kiam ni estis alvenintaj antaŭ la fajreja ŝtonplato, solene sur la ŝtipon mia patro disverŝis glason da kuirita vino, dirante:

Ĝojego! Ĝojego!

Bel' infan' miaj, Dio al ni donacegu ĝojegon!

Kun Kristnasko, ĉio bonvenas.

Dio donu la favoron al ni, vidi la proksiman jaron.

Kaj se ne pli multaj, malpli ni ne estu.

Kaj ĉiuj ekkriante: « Ĝojego, ĝojego, ĝojego! », oni metis la ŝtipon sur la ŝtipportilojn. Kaj, tuj kiam elsprucis la unua flamo:

Ĉe la ŝtipa,  
Ekfajras!

diris mia patro, sin kruccsignante. Kaj ĉiuj, ni sidigis ĉe l' tablo.

Ho! la sankta tablo, vere sankta kun, tute ĉirkaŭe, la familio kompleta, pacema kaj feliĉa. Anstataŭ la *caleil* (kalej) pendanta per kano, kiu, dum la jaro, lum-

igis al ni per sia lumigilaĉo, tiun tagon sur la tablo tri kandeloj brilis; kaj se, iafaĵe, al iu la meĉo kliniĝis, tio estis malfavora antaŭsigno. Ĉe ĉiu ekstremaĵo, en telero, verdiĝis herbo de greno, kiun oni metis en akvon, por ĝermi, la tagon de Sankta-Barbarino.


Sur la triobla blanka tablotuko, aperis laŭvice la sakramentaj manĝaĵoj: la helikoj, kiujn, per longa najlo, ĉiu el la konko eltiris; la fritita gado kaj la *muge* kun olivoj, la kardono, la skolimo, la celerio kun pipraĵo, sekvotaj de kvanto da frandaĵoj rizervitaj por tiu tago, kiel: fuas' (speciala plata kuko), sekigitaj vinberoj, migdalkuko, paradizaj pomoj; fine, supera al ĉio, la granda *pano kalendal*, kiun oni neniam ekmanĝis, antaŭ ol esti doninta, religie, unu kvaronon, al la unua malriĉulo pasinta.

La vespero, dum oni atendis la noktomezan meson, estis longa tiun tagon; kaj longe, ĉirkaŭ la fajro, oni dume parolis pri la malnovaj praavoj, kaj oni laŭdis iliajn farojn. Sed, iom post iom kaj volonte, mia bonega kaj estiminda patro revenis al Hispanujo kaj al siaj memoroj pri la sieĝo de Figeras.

— Se mi dirus al vi, li komencis, ke, estante tie en Katalunujo, kaj apartenante al la armeo, mi sukcesis, dum la plej terura epoko de la Revolucio, veni de Hispanujo malgraŭ la milito kaj malgraŭ

ĉio, pasigi kun la miaj, (*kun mia familio*) la Kristnaskajn festojn! Jen, per mia fido al Dio, kiel la afero aranĝiĝis:

« Malsupre de Kanigu, kiu estas granda monto inter Perpinjan kaj Figeras, ni ronde iris kaj reiris de post sufiĉe da tempo, batalante, al ci, al mi, kontraŭ la hispanaj soldataroj. Aj! kiom da mortintoj, kiom da vunditoj kaj da suferoj kaj da mizeroj; necese estas, ke oni ĝin vidis, por ĝin scii. Plue, ĉe la tendaro, —



LA ANTAŬVESPERO DE KRISTNASKO: BENO AL LA ŜTIPO.  
Provenca scenejo prezentata en la Arlatan'a Muzeo.

(1) Ni penadis konservi la naturecon kaj malsolenecon de la originala rakonto, kaj ankaŭ la stilon. Iafaĵe ni metis inter krampojn, per kursivaj literoj, la eble necesajn klarigojn. Noto de la tradukinto. — (2) *Ia Jaro*, 5<sup>a</sup> No.

tio okazis en decembro, — estis manko pri ĉio, kaj la muloj kaj ĉevaloj, pro foresto de paŝtejoj, dentiŝiris, ho ve! la radojn de ŝargveturiloj kaj kanon-potiloj.

« Nu, okazas, ke vagante funde de intermonto, apud la maro, mi trovas arbon de oranĝoj, kiuj estis flavruĝaj kiel oro.

— « Ha, mi diras al la posedanto, je kioma ajn kosto, tuj ilin al mi vi vendos.

« Kaj, ilin aĉetinte, senhalte al la tendaro mi aliras; kaj tute rekte al la tendo de kapitano Perrin (kiu devenis de Cabanes) kun mia korbo mi aliras, kaj al li diras:

« — Kapitano, mi alportas al vi kelkajn oranĝojn...

« — Sed kie ci (1) prenis tion?

« — Kie mi povis, kapitano.

« — Ho! ruzulo, ci ne sciis fari al mi pli da plezuro... Tial petu de mi, ja, kion ci volos, kaj ĝin ci ricevos, aŭ... mi ne povos.

« — Mi bonvolos, tiam mi diris, antaŭ ol kanonkuglo duone min dispecigos, iri ankoraŭ unu fojon, « meti la Kristnaskan ŝtipon » en Provenco, ĉe mia familio.

« — Nenio pli simpla, li faras; nu, donu al mi la skribilaron.

« Kaj mia kapitano Perrin (Dio, en la paradizon estu lin enfermita, karan viron) sur papero, kiun ankoraŭ mi havas, skribaĉis tion, kion mi tuj diros:

*Armeo de l' Orientaj Pireneoj.*

*« Ni, Perrin, kapitano je l' militaj transportoj, donas libertempon al la landano Francisko Mistral, brava respublikista soldato, dudekdjara, kvin julojn ses colojn da kresko, haroj kaj brovoj kaŝtankoloraj, okuloj flavruĝaj, nazo ordinara, buŝo same, mentono ronda, frunto meza, vizaĝo*

*oval, iri en sian landon, tra la tuta Respubliko, kaj al la diablo, se plaĉos al li.»*

Kaj jen, amikoj miaj, ke mi alvenas en Maillane (Majan') la belan antaŭtagon de Kristnasko, kaj vi povas imagi la kvazaŭ malspritiĝon de ĉiuj, la ŝmacojn kaj la festojn. Sed, la morgaŭon, la urbestro (mi maldiros al vi la nomon de tiu kriaĉema fanfarono, ĉar liaj infanoj ankoraŭ vivas) venigas min ĉe la komunumon, kaj min ekparolas tiel:

« — Je l' nomo de la leĝo, landano, kiel okazas, ke ci forlasis la armeon?

« — Tio okazas, ĉar min fantazio kaptis, veni tiun ĉi jaron, « meti la ŝtipon » ĉe Maillane.

« — Ha jes? Tiuokaze ci iros, landano, klarigi la aferon ĉe la tribunalon de l' distrikto, en Taraskon'on.

« Kaj, kiel mi ĝin diras al vi, mi lasis min konduki, de du naciaj gvardianoj, antaŭ la juĝistojn de l' distrikto. Tiuj ĉi, tri malagrablegaj vizaĝoj, kun la ruĝa ĉapo kaj barboj longegaj:

« — Landano, ili diris al mi, rulante dikajn okulojn

(kun timiga mieno), kiel okazas, ke ci servforlasis?

« Tuj, el mia poŝto eltirinte la pasporton:

« — Prenu, legu, al ili mi diris.

« Ha! miaj amikoj de Dio, tuj leginte, ili stariĝas,

skuate al mi la manon:

« — Bona landano, bona landano! ili krias al mi. Iru, iru, kun tiaj paperoj ci povas, sendi lin kusiĝi,

la urbestron de Maillane.

« Kaj, post la Novjartago, mi povis restadi, ĉu ne vere? Sed estis la devo... kaj mi reiris al mia posteno.»

*Tradukis A. MONTROSIER,  
Ano de « Esperantista Vagabonda Klubo ».*

## UNUA ARTA MANIFESTACIO DE ESPERANTISTOJ.

Ĉe la Kembriga Kongreso. Raporto pri la arta ekspoziciejo de la E. V. K.

La arta ekspoziciejo estis tre alloga kaj populara aldono al la ĝenerala ekspozicio, kaj la granda staraĵo (angle: screen) kiu estis konstruita meze de la ekspoziciejo por elmontri la pentraĵojn, havis senĉese sian grupeton da admirantoj.

Bedaŭrinde, ni ne havis sufiĉe da spaco por elmontri plej bone la pentraĵojn, kaj multaj el ili tute perdis sian ĉarmon, ĉar ili devis esti pendigitaj apud aliaj, kiuj — pentrartiste parolante — « elfrapis la tutan koloron el ili », aŭ « igis ilin, malbeni unu la alian ». La proksiman jaron, ni esperas trovi bonan galerion por montri niajn artaĵojn.

En la honora loko vidigis akvarelo de S<sup>ro</sup> Walter Crane, la glora angla pentrartisto, kiu montris poezian figuron de virino, starante sur marbordo, rigardante la unuajn signojn de sunleviĝo ĉe la horizonto. Nia holanda membro, S<sup>ro</sup> Bern, sendis du bonajn verkojn, el kiuj unu, marbordvidaĵo, donis al la vidanto senton de refreŝiĝo en la iom tro homplena ĉambrego. Francujo pruntedonis du lertajn « impresajn » (impressionistes) pentraĵojn, « novaj Domoj » kaj « Korto de Pajl-tegmenta Dometo », de la broso de S<sup>ro</sup> Ludoviko Rodo; kaj S<sup>ro</sup> Lucien Pissarro, la fama Londona artisto, montris desegnon: « La Lavistinoj », verkitan laŭ lia bonkonata stilo.

S<sup>ro</sup> A. Hulme elmontris du paŝtelojn, kaj unu olea-pentraĵon. La plej bona el la tri estis « La Brakumo », tre agbla kombinaĵo el « kvietaj » koloroj. D<sup>o</sup> Cunningham montris tri pejzaĵojn, el kiuj du estis tre simpatiaj.

La Brajt-Hovaj artistoj sendis tre interesan areton da verkoj. S<sup>ro</sup> Bond, la Estro de la Brajtona Urb-Artlernejo, montris du malgrandajn « studojn » de Holandaj ŝarĝboatoj, ambaŭ lertajn; sed ni esperis, ke li sendus pli gravan verkon al nia unua ekspoziciejo. F<sup>ino</sup> K. Thornton estis verkinta seriojn da desegnoj por Esperanta kartludo por eklernantoj, kiuj estis tre bonaj, sed la klariga teksto montris, ke ŝi ne ankoraŭ tute venkis la Esperantan gramatikon, sed ni devas pardoni tion, tial ke la desegnoj mem estis la elmontraĵo, ne la teksto. Unu

el la plej bonaj montraĵoj estis la desegno por aŝiŝo, verkita de F<sup>ino</sup> L. Rusbridge, juna artistino, kiu devus sukcesi estonte pro sia lerta kaj individua stilo; ŝi ankaŭ montris tre simpatian figuron de knabino, kiu tagrevas dum sia alhejmarŝo. F<sup>ino</sup> F. Morse havis du belajn skizetojn de Taraskonaj stratoj, kaj F<sup>ino</sup> Hultman estis desegninta kaj kudrinta tre belan kusenkovrilon. Inter la aliaĵoj, S<sup>ro</sup> Dower Wilson sendis tre ĉarman « Kapon de Virino », sed oni ne povis diri, ĉu ŝi dormas, aŭ nur modeste fermas la okulojn, por ke ŝi ne tro allogu la tro facile allogoblajn virojn. S<sup>ro</sup> Jackson ankaŭ studas la virinan belecon, kaj verkis per plumo kaj inko « Kapo » de alia ĉarmulino, sed ne tiom alloga, kiel tiu de S<sup>ro</sup> Wilson.

Ni pensas, ke multaj personoj eĥois la rimarkon de sinjorino, kiu demandis: « Kion faras la arta ekspoziciejo pri Esperanto? » Vere, ne multe; ne estis ia tute esperanta verko, sed tio ne estas la celo de la klubo. La celo estas: fari frataron da artistoj per Esperanto, kaj per ili propagandi la Esperantismon. Se, ĉe ĉiu kongreso, ni sukcesos organizi pli kaj pli gravan internacian ekspozicion de artaĵoj, tute certe ni grade altiros pli kaj pli da artistoj, kiuj, se ili ne estos efektivaj esperantistoj, pro manko de tempo aŭ aliaj kaŭzoj, almenaŭ devos — vole nevole — helpi propagandi la lingvon, per la simpla fakto de la sendo de siaj verkoj; tion farinte, ili profitos per la pli internacia publikeco donita al ili per la raportoj de la Esperantaj ĵurnaloj, kaj per la amikaj rilatoj, kiujn ni esperas naski per tiu ĉi klubo, pli intimaj kaj amikaj ol tiuj de ordinara societo.

Brita E. V. K. anino.

Alia manifestacio de la « Esperantista Vagabonda Klubo » estis bonhumora vespermanĝo, kiu kunsidigis, sub prezidanteco de D<sup>ro</sup> Zamenhof, ĉirkaŭe tridek anojn, ĉeestantajn en Cambridge.

(1) Dum la franca Revolucio, la landanoj ĝenerale diris ci unu al la alia.

## Eksmajoro Claes Adelsköld. †

La 1<sup>an</sup> de Oktobro mortis en sia hejmo en Stockholm S<sup>ro</sup> Claes Adelsköld (*Elp. Klas Adelsköld*), eksmajoro en la Sveda Korpuso de voja kaj akva konstruado, 83-jara.

Adelsköld estis viro tre konata en Svedujo; precipe li estas fama pro tio, ke li faris per sia mano la komecan ŝovelmovon mem por la unua fervojo en Svedujo. Tio okazis la 5<sup>an</sup> de Majo 1849. Sed li estas fama kaj ŝatata ne sole kiel konstruisto de fervojoj; ankaŭ en la politika, scienca kaj artista vivo li ludis gravan rolon. Sian laborplenan vivon, siajn vojaĝojn kaj aliajn spertojn li lerte kaj interese priskribis en sukcesaj verkoj.

De 1870 li estis membro de Reĝa Scienca Akademio Sveda, kies *præsæs* li estis en 1892.

En la esperantistaro la nomo de Adelsköld certe ne estas tute nekonata. Por la Svedaj esperantistoj lia nomo, dank' al sia aŭtoritato, estis bona apogo al la Esperanta propagando en la komencaj tagoj. De tiam li konstante montris intereson je la progresado de Esperanto. Adelsköld verkis muzikon por la himno Espero, sendube la unua muzika verko Esperanta — tamen muziko kvarvoĉa iom tro arta, se oni komparas ĝin kun la populara melodio de S<sup>ro</sup> de Mênil.

Per la morto de Adelsköld la Patrona Komitato de Internacia Scienca Revuo perdis unu el siaj membroj.

Adelsköld estis « kavaliro sen timo kaj sen riproĉo », viro simpatia kaj nobla, laborema, entuziasma, junulo ankoraŭ kvankam okdekjara.

Klubo Esperantista en Stockholm sendis al la tombo de tiu sia honora membro belan florkronon kun rubandoj Esperantokoloraj, verda kaj blanka, kies surskribo:

« Varmakora Vi vivis,  
entuziasma Vi laboris,  
junanima Vi mortis »,

estas bona karakterizo de la mortinto.

Kiel inter liaj samlandanoj, tiel ankaŭ en la Esperantistaro la memoro de Claes Adelsköld longatempe vivos.

PAUL NYLÉN, Svedujo.

## Ulisse Aldrovandi.

La 11-13<sup>an</sup> de Junio okazis en Bolonjo la festoj pro la tria centjaro post la morto de la glora itala naturisto kaj enciklopediisto Aldrovandi. (1522-1607).

Tiu ĉi mondfama scienculo pasigis sian tutan vivon lernante, profesante, verkante. Precipe la naturscienco altiris lian atenton, sed vera enciklopediisto kaj meritinte justan komparon kun Aristotelo, li verkis pri la plej malsamaj temoj: leĝoj, antikvaj kutimoj, anatomio, bestoj, numismatiko, edukado, fabeloj, mirakloj, manĝaĵoj k. t. p. Lia verkaro pensigas iom pri la nomo de Franco Rabelais pro la diverseco de la konoj sed ne pro la gajeco. Ni citu 13 dikajn volumojn pri *naturhistorio*, kiuj donigis al li la titolon de « unua naturisto de la XVI<sup>a</sup> centjaro ». Oni povas ankaŭ diri, ke li superis siajn samtempulojn kaj antaŭulojn en la eksperimenta metodo. Eĉ pro tio, li povas esti konsiderata, kiel antaŭulo de Galileo.

Tial Aldrovandi decidigis la Bolonjan senaton, krei botanikan ĝardenon, kiun li deziris « fama kaj memorinda tra la tuta Eŭropo ». Tial li organizis grandiozan muzeon: Teatron de la naturo, en kiun li enmetis plej maloftajn rimarkindaĵojn kolektitajn dum siaj pilgrimadoj aŭ vojaĝoj, kaj donacitajn de siaj lernantoj aŭ de princoj.

La festoj celis ankaŭ la restarigon de la muzeo de Aldrovandi.

La Senatano Capellini, iniciatinto de tiu ĉi ideo, klopodis longe por la reordigo de la muzeo, kun la helpo de Proj Oreste Mattiolo, Emery kaj Droj Ghigi kaj Gortani.

Partoprenis en tiuj solenaj tagoj la reprezentantoj de ĉefaj fremdaj kaj italaj universitatoj. Italujo povas esti fiera, ĉar Aldrovandi, laŭ la parolo de Pro Emilio Costa, pligrandigis la homan sciencan, fonton de universala frateco.


ACHILLE TELLINI,  
el Udine, Italujo.

La bonega fotografo, laŭ kiu ni farigis la ĉi suban klišaĵon, estas ŝuldata al la sindona prezidanto de la grupo de Hanau, aŭtoro de artista afiŝo por anonci la kursojn: S<sup>ro</sup> Ch. Stoll.

## Ĉirkaŭ la Kvara.

D<sup>ro</sup> Zamenhof en Nauheim kaj Frankfurto.

La 1<sup>an</sup> de Septembro niaj karaj majstro kaj majstredzino ricevis en Nauheim, kie ili pasigis unu monaton da ripozo, kaj kie ili uzis la sanigajn salo-banojn, la viziton de ĉirkaŭ 100 germanaj samideanoj, inter kiuj estis D<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Mybs. Post diversaj paroladoj kaj esperantaj koutadoj, la ĉeestantoj garantiis Mk. 500 por la IV<sup>a</sup> kongreso. La 15<sup>an</sup> de septembro D<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Zamenhof oficiale vizitis la Frankfurtran grupon. Tre bela festo okazis; post multe aplaudita parolado de D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj aliaj, parolis S<sup>ro</sup> Gaston Moch el Parizo. Fine S<sup>ro</sup> Voigt, blindulo, diris, kiom dankemaj la blinduloj devas esti al D<sup>ro</sup> Zamenhof, al Prof. Javal kaj Prof. Cart.



Fot. Stoll.

DOKTORO ZAMENHOF EN NAUHEIM  
D<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Zamenhof, S<sup>ro</sup> Barthel.

Ambaŭ festoj estos neforgeseblaj por ĉiuj ĉeestantoj; samtempe ili estis bona antaŭsigno por la IV<sup>a</sup> kongreso en Germanujo.

BARTHEL.

## "La Kvara"

Niaj germanaj amikoj ne perdis sian tempon. Post ekzameno de ĉiuj konsideroj kapablaj ilin gvidi, ili elektis Dresden', la ĉefurbon de Saksujo, kiel ejon por « la Kvara ». La *Kvaro* por la *Kvara* konsistas el D<sup>ro</sup> Mybs, D<sup>ro</sup> Schramm, Referendario Arnold kaj S<sup>ino</sup> Hankel. Krom tio oni starigis kvin komitatojn, kiuj dividas inter si la kongresajn laborojn. Estas nun la devo de ĉiuj gravaj esperantistaj grupoj, ke ili sendu reprezentantojn en la Kongreson. Pro tio estas necese, ke ĉiu kongresvizitonto sendu kiel eble plej baldaŭ sian adreson al la Kvarestro S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Mybs, Altona, Marktstr., 68. Plie ni petas ĉiujn mal-avarajn Esperantistojn, ke ili helpu plenumi nian kongreskason. Ekzistas du kaso, unu por libervolaj monferoj, la dua, por doni garantian kontraŭ kongresa defikto. En la unua ĉiuj arbitraj sumoj estos bonvenataj, en la dua minimume 200 Mk. (100 Sm.), La kongreslaboroj jam komencis, kaj ankaŭ la registro estas sufiĉe esperantema, tiel ke la Kongreso certe sukcesos, se kiel eble plej multe da Samideanoj aliĝos.

Proksime de la kongresurbo oni intencas aranĝi Esperantan Vilaĝon, en kiu parto de la kongresanoj povos loĝi kelkajn semajnojn, antaŭ kaj post la Kongreso, babilu Esperante kaj amuziĝi. Sciigojn pri la aranĝado de tiu ĉi Vilaĝo oni ricevos pliposte. Kompreneble estas tre dezirinde, ke ankaŭ por nia Esperantujido Kongresanoj multenombre aliĝu.

El letero de S<sup>ro</sup> SERGIUS WINKELMANN,  
(Dresden).

Ni povas aldoni, dank' al specialaj informoj, ke espereble, la kongreso estos prezidata de grava Saksuja eminentulo.

Ni konsilas al niaj legantoj, ke ili tuj *TRE LEGERBLE* sciigu sian intencan, ĉeesti la kongreson, per la jenaj vortoj:

Mi intencas ĉeesti « la Kvaran » en Dresden'o. Nomo.....  
Baptonomoj..... Adreso....., skribitaj sur poŝtkarto adresita al:

Oficejo de la Germana Esperantista Societo,  
Marktstrasse, 68, Allona (Elbe), Germanujo.



mero. Ili estas afable pruntitaj de «Fon-Fon» kaj de la belega «Renascenta».

### REABONO.

Ni petas ege miajn abonintojn, kies abono finiĝas kun la decembra numero, ke ili bonvolu **TUJ** sendi sian reabonon, por eviti prokraston en la ricevo de la novjaraj numeroj, kaj por plifaciligi al ni la preparon de la listoj kaj banderoloj.

Tiu laboro, estas tre delikata kaj zorgbezona; kaj oni ne povas atendi la lastan tagon, por ĝin komenci.

Por eviti al ni tre gravajn monperdojn pro makleraĵoj, ni insiste petas, ke oni renovigu **senpere** la abonojn.

**Adreŝsanĝoj. Grupoj atentu!** — Okazas ofte, ke grupoj ŝanĝas sian sekretarion, ne sendante sufiĉe precizajn sciigojn: numeroj perdiĝas, kaj oni petas aliajn. Ni rememorigas, ke ni ne povas akcepti, pli ol naciaj gazetoj, la respondecon de tiaj perdoj.

*Plue oni bonvolu ĉiam sendi 50cm (20 sd.) por la adreŝsanĝoj, escepte, kompreneble, kiam oni renovigas abonon.*

« TRA LA MONDO ».

**Novaj gazetoj.**—*Hungara esperantisto* reaperas sub la nomo *la Verda Standardo*, kaj la direktado de S<sup>ro</sup> A. de Marich (4 kr. ĉe S<sup>ro</sup> Medgyesi, Budapeŝt VII, Alpar-u. 8). — Ni ricevis 2 novajn organojn: *Verda Stelo*, organo de Centra Meksika esperantista societo, kaj *Saksa Esperantisto*, aperanta jam de 5 monatoj (1,50 m. ĉe Redakteur Fritz Stephan in Leipzig). Tiu bela aktiveco pravas la progresojn de **Esperanto** kaj la belan fervoron de ĝiaj konfidemajanoj. Al niaj novaj kunfratoj kaj al la standardoportantoj, niajn plej korajn dezirojn!



Kl. «Renascenta».

GAZETARA EKSPOZICIO DUM LA BRAZILA KONGRESO.

Plue, ĉiuj laboru por helpi al la sukceso de la Kvara.

Ni multe konsilas la legadon de *Germana Esperantisto*. Aboni ĉiujare la oficialan organon de la lando, en kiu okazas la kongreso, estas kompreneble la unua prepara ago de ĉiuj, kiuj intencas ĉeesti la kongreson, kaj ankaŭ de ĉiuj societoj kaj propagandistoj indaj de tiu nomo. Plezure ni transdonos abonojn al nia kunfrato.


Niajn germanajn samideanojn ni atentigas ankaŭ pri «Eĥo Esperantista», la bonega aldono de «Das Echo». Ĝia antaŭlasta numero sciigis nin pri sukceso atingita en la 16a kongreso de Paco. Dank' al la penadoj de S<sup>ro</sup> Gaston Mochi, oni akceptis Esperanton *kiel kongreslingvon* por la estonta kongreso en Stockholm, laŭ la propono de S<sup>ro</sup> Arnhold el Dresden: rimarkinda rezultato fruktodonanta, kiu faras honoron al niaj samideanoj. «Eĥo Esperantista» raportas ankaŭ pri la dudekkvina jubileo de «Das Echo» kaj admonas la germanlingvajn samideanojn, subteni la iniciaton poresperantan de nia grava germana kunfrato.

### Diversaj sciigoj.

En multaj landoj oni sin preparas al la Kvara, kaj ni ricevis speciale kuraĝigajn sciigojn de Toronto (Kanado), kie oni preparas agadon ĉe la ĝemstruistoj (El letero de la prezidanto S<sup>ro</sup> R. Sangster), kaj de Astrahan (Rusujo). En Tananarive (Madagaskar), granda festo por rekomenci la agadojaron, pri kiu longe raportis ĉiuj gazetoj: «Le Petit Courrier», «Le Réveil», «La Tribune», k. a.

Ni eksciis kun plezuro, ke kurso estas farita al enlanduloj *konantaj jam la francan lingvon*. Paroladoj de la agema prezidanto K<sup>no</sup> Fortin, de S<sup>ro</sup> Legendre, prezidanto de l' tribunalo, de S<sup>ro</sup> Monclar, la sindonema Sekretario entuziasmigus la ĉeestantojn.

Ni donas en tiu numero 2 vidaĵojn de la Brazila Kongreso, laŭ kliŝaĵoj alvenintaj tro malfrue por la oktobra nu-



Kl. «Fon-Fon».

LA MALFERMA KUNSIDO DE LA BRAZILA KONGRESO.



H. TANNER.

LA SKIFESTO EN ADELBODEN.  
*Triumfarko.*



PARTO DE ADELBODEN, KUN LA ĈENO DE NIESEN.  
*La monto Albrist 2700 m.*

## La Vintro en la Alta Montaro.

La granda inklino al la vintraj stacioj dum la lastaj jaroj rajtigas min, priskribi por tutmonda legantaro kelkajn agrablajn de la vintro en l' alta montaro. Por ĝui ilin, oni devas supreniri ĝis pli ol 800 metroj da alto, super la maro, kie komenciĝas la alpa klimato. En alta montaro la atmosfera premo estas pli malalta en vintro, ol en somero, kio kaŭzas pli belan veteron daŭran dum vintro, kaj tial pli kaj pli altiras la fremdularon. Oni miras, ke ofte, dum la vintro, ni havas varmon kiel en somero! Tion okazigas la pli maldensa aero, senigita de malsekaĵo, kaj ebliganta al la sunradioj trapasi l' atmosferon ne haltigitaj. La termometro montras iaforte temperaturojn ĝis 30-40 gradoj C, dum ĉe l' ombro ĝi estas ĉirkaŭe 0°. La aero do ne multe varmiĝas, kiel korpajoj; la neĝo, reĵetanta la sunradiojn, ne povas sufiĉe fluidiĝi. Oni do povas iri sur glitŝuoj, vestita kiel en somero. Oni ofte ankaŭ manĝas tagmeze sub libera ĉielo. Pro la sama seka maldenseco de l' aero, la malvarmo ne estas malagrable sentita ĉe ni. Post la kuŝiĝo de l' suno, la temperaturo malaltiĝas kaj atingas ofte 10 da frosto kaj pli.

La vintra sezono komenciĝas je la fino de novembro, kaj daŭras ĝis la mezo de marto. Dum tiu tempo la plej gaja vivo regnas en nia vilaĝo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Sur ĉiuj kampoj troviĝas multo da sinjorinoj kaj sinjoroj de ĉiunaĝaj, por sin ekzerci pri la skiglitado.

Sur la larĝaj ŝuglitatejoj la artistoj gracie sin movas, kaj sur la poŝta strato kaj sur speciale faritaj vojoj, malsupren glitas la sportuloj. Estas bruoplena vivo, ĉar ĉiam oni devas ekkrii, por atentigi tiujn, kiuj alvenas sur la kurbhavan straton.

Kurioze estas, ke la ski aŭ pli bone « ŝi » (kiel oni devus elparoli) estas uzata nur de ĉirkaŭ dek jaroj

en niaj montoj; ĉar ĝi estas la plej praktika ilo por trapasi la altajn neĝmasojn. La ski estas longa lignaĵo, pli longa ol la alto de homo, kaj larĝa kiel proksimume 1 mano, dika je 2-3 centimetroj. Antaŭe ĝi estas kurbigita supren. En la mezo de la lignaĵo la piedoj estas ligitaj, nur ĉe la piedfingroj, por ke oni povu genufleksi sur ĝi. Tio malhelpas rompon de l' piedo, ebligante por ĝi la plej grandan elasticcon. Do la direktado fariĝas nur per la pinto de l' piedo, kaj oni devas zorgi, ke la du skioj estu ĉiam direktataj laŭ la natura diso de la kruroj. Estas kredeble, ke ne ĉiuj uzataj movoj povas esti farataj sur ili, kaj ke oni ofte falas. La releviĝo estas tre malfacila komence.

La ordinara antaŭenmovo fariĝas per glitado, ne marŝado, eĉ sur ebenaĵo. Por supreniri monteton krutan, oni devas zigzagi, kaj la konstanta sinturno okazigas novan malfacilecon, pro la maloportunaj movoj, kiuj estas necesaj. Por la malsupren-glitado oni bezonas multe da facilmoveco kaj elasteco, ĉar oni devas regi ĉiujn muskolojn, por konservi la ekvilibron dum la rapida flugado. La genuoj devas resti flekseblaj, por ekvilibri la korpopezon. Mi ne povas priskribi ĉiujn detalojn de la instruado, kiel la arton de l' turniĝo kaj de la halto, la supreniradon kaj la malsupren-glitado, k. t. p. Sen praktiko, tio estus senutila. Sed, se oni lernis unufoje ĉiujn tiujn artojn, tiam oni konstato, ke la skikurado estas la plej bela vintra sporto, ĉar ĝi ebligas vagadon tra kampoj kaj arbaroj, tra suproj kaj valoj, kondukante la videmulojn en ĉiujn mirindejojn de la vintra naturo, montrante ĉiam novajn vidaĵojn el la riĉa Alpa scenejo. Allogo de Adelboden (1) kiel skisportejo estas la divido de la valfundo laŭ kvin valetoj, disigitaj de montoj, tiel

(1) Oni komparu la priskribon de Adelboden en la 3<sup>a</sup> N<sup>o</sup> de « Tra la Mondo » 2<sup>a</sup> jaro kaj en « Tra Berna Oberlando », ilustrita guidlibreto.

ke oni havas multon da ŝanĝeblaj ekskurskampoj kaj sufiĉe da spaco por multaj vizitantoj. Mi do nur povas kuraĝigi ĉiun, ne timi la unuajn malfacilaĵojn, sed lerni tiun sanigan ekzercon. En la svisaj alpoj ĉiujare okazas skikursoj, kaj la skifestoj devas elmontri la progresojn. Ili konsistas el daŭra kuro kaj salto. La bildoj montras la ekkuron de la partoprenantoj. Okazas vetkuroj por junuloj, sinjorinoj kaj sinjoroj. Ili devas suprenkuri montetojn aŭ montojn de 1-500 metroj da alto, kaj trairas tiun vojon ofte en 15 minutoj. Por la pli longaj kuroj oni iras tra alpvojo en alian valon, kaj trakuras 15-20 kilometrojn kaj 700 metrojn da altdiferenco en 2 1/2 horoj! Oni povas atingi rapidecon nekredoblan.

Por la salto estas necese aranĝi specialan saltmonteton.

Oni ne povas salti super bariloj, sed nur malsupren de monteto, sur akran deklivon. Do oni vere flugas, kiel montras la bildo. Dum la flugado oni svingas la brakojn ronde kaj devas alveni teren starante, kaj sekvi la vojon ne falante! Oni povas tiel flugi ĝis 7, 10 aŭ eĉ pli da metroj. (En la nordaj landoj ĝis 20 metroj!)

La glitveturiloj estas diversspecaj. Krom la malgrandaj lignaj por unu aŭ du personoj, oni uzas pli longajn ferajn por 5 personoj: la nomitajn *bobsleigh* (elparolu bobsle). Ili estas konstruitaj el du glitiloj kunligitaj. La personoj sidigas unu antaŭ la alia. La plej antaŭa gvidas, la plej malantaŭa haltigas per fera kombilego, ĉar tiu glitilo alprenas grandan rapidecon; kaj por turni ĝin laŭ la kurboj de la strato, ĉiuj sursidantoj devas klini la korpon al tiu flanko.

Sur la glaciejoj oni ne nur faras artistajn movojn per la glitiloj, sed ankaŭ ludojn; precipe la anglaj vizitantoj ŝatas la «hokey»: du partioj celas ŝovi malgrandan lignaĵon per bastonoj en la celon de la alia partio, kion ĉiu partio penas malebligi. Skota ludo estas la «kurling». Grandaj rondaj ŝtonoj, plate akritaj estas ŝovataj per tenilo en rondojn desegnitajn en la glacio. Per balailoj la partianoj glatigas la vojon, por ke ili glitu pli bone. Vespere la vizitantoj multe amuziĝas per ĉiuspecaj aranĝoj, kiel alivestitaj k. maskaj glacifestoj, aŭ ili organizas koncertojn, balojn aŭ aliajn amuziĝojn en la vastaj haloj de la bone aranĝitaj hoteloj.

Fine mi diros ion pri la koloroj de la alpa vintro. Oni ne kredu, ke nur la blanko regnas. Kiam neĝo falis, ŝajnas ekzisti nur du koloroj, blanka tero kaj blua ĉielo; sur tiu tapiŝo la suno briligas milionojn da diamantoj. Sed baldaŭ la neĝo elfalas de la arboj kaj abioj, kaj tiuj malhelaj arbaretoj vidiĝas en griza, verda, blua kaj violblua koloro, laŭ ilia malproksimeco. La ĉielo, kiu estas, dum la tago, tiel malhelblua, kiel en la sudaj regionoj, vespere, je la mallevego de la suno, koloriĝas per la preskaŭ tuta gamo de la ĉielarko, de la viola koloro, oriente, ĝis la ruĝflava, okcidente. Tiu helkolora ĉielo lumigas la suprojn de la montoj, kiuj respondas al tiu saluto per fajra ruĝo, por paliĝi poste, kaj atendi la lunon, la silentan noktan akompananton, kiu produktas ankaŭ la plej strangajn lumefikojn.

Estas do videble, ke la vivkondiĉoj dum la vintro estas multe pli agrablaj en la montaro, ol en ebenlando. Pro tio, ĉiu, kiu povas, venu vidi la mirindaĵojn, almenaŭ dum la kristnaskaj liberaj tagoj. Tia vojaĝo, eĉ nur kelktaga, naskos veran ĝuadon.



LA SALTO.



VINTRA MATENO EN ADELBODEN.  
La ĉeno de Wildstrubel.



EKIRO DE LA VETKURANTOJ.

TH. HOFF, apotekisto.  
Esperanta oficejo kaj konsulejo  
Adelboden, Berna Oberlando.



# TRA LA MODO



Ho! Modo, kruela reĝino, kion vi postulas de ni? Forlasi niajn subjupojn tiel senkompare malpezajn, niajn subjupojn kun konfuziga ĉarmo, niajn subjupojn, kiuj similigas nin al multvaloraj floroj, kiujn, pro ilia delikateco, oni envolas en silkecan paperon..... kia korsiranta ofero! Ĉar, kvankam tre

luksa, la tute ĝustalfarita pantalono el at-laso, kiu anstataŭigas ĝin, ne povas esti tiel vapora. Sed, la nunan vintron, tiel fleks-eblaj estas niaj roboj, ili tiel multe des-egnas niajn formojn, ke vera laŭmodulino devige obeas la Modon, kaj flanklasas siajn subjupojn..... eble bedaŭre ekĝem-ante, sed ĝojante montri la gracion silueton formitan de sia plastika beleco.

La nova jupo naskita de tiu modo neimageble muldas la koksojn, sed oni havis la genian ideon kaŝi la mezon de la antaŭaĵo de l' jupo — tro ĝustal-farita — per du-tri faldetoj laŭlarge, kiujn tenas elastajo. (Tion montras nia modelo). Malsupre de tiu ĉi elastajo la jupo formas flekseblajn faldojn, Rimarkinde estas, ke la supra parto de l' jupo komenciĝas ĝuste malsupre de l' busto, lasante diveni la talion nur per neprofunda arkokurbiĝo ĉe l' flankaj kunkudroj. La maldikaj virinoj, kiuj surmet-as tian jupon, havas flekseblecon kaj elegantecon senkomparajn.

Sendube ĉar la kompatema Modo memoras, ke la pasintan vintron niaj brakoj estis tute violetigitaj de l' malvarmo, ĉiuj nunaj modeloj havas longajn manik-ojn mallargajn aŭ japanajn. Tiuj ĉi lastaj, tre largaj ĉe la manikloko, plimallargiĝas malsupre de l' kubuto. Por laŭmodigi la korsajojn de la antaŭa vintro, oni pli-longigas la manikojn per largaj return-ajoj el veluro aŭ el galonizita drapo. Per la sama drapo oni kaŝas la kunkudron de l' manikloko.

La nunan sezonon triumfas la longaj jaketoj pleje borderitaj per galono. Tre novaj kaj elegantaj estas la kostmoj dukoloraj. Ekzemple tre luksa modelo montras veluran jupon striitan, nigran kaj olivoverdan, kun intensverda jaketo garnita per tiu sama veluro. Alia montras jupon el blua drapo kun nigra jaketo ornamita per brodaĵo el galonplektaĵo sam-kolora kiel la jupo.

La jaketoj kaj paltoj, ĝustalfaritaj nek antaŭ nek malantaŭ, havas tre altajn kolumojn kun returnaĵoj devenantajn de l' strangaj modoj de la Direktoria epoko, el kiuj eliras — kiel en tiu tempo — tre elegantaj kravatoj kvazaŭ enfermantaj la mentonon, aŭ ankaŭ vaporaj puntfald-ajoj. Tre modaj kaj ankaŭ — bedaŭrinde! — tre karaj, la ŝalaj el Ĥina krepjo kun brodaĵoj kaj longaj franĝoj, per kiuj tiel ĉarme sin ornamas niaj hispanaj fratinoj.

Tute novaj ankaŭ la veŝtoj el « cachemire » (kaŝmir') mult-kolore broditaj, konkurantaj kun la japanaj brodaĵoj ĉiam multe ŝatataj.

La modaj ŝtofoj estas melongenkoloraj — kies tro granda sukceso ne longe daŭros — bluj-« Nattier », kaki'aj, oliv-verdaj, pavbluaj — ekmetitaj ĉe « l'Odéon ». La nuanco nomata « Loupillon » (Lupion') estas tute nova; ĝi estas iom pli pala ol la vino el Bordeaux.

Nia modelo, kies jupo estas « la lasta krio de la modo », havas boleton kun ŝtofa surkudraĵo kaj japanajn manikojn. Kolumo kun returnaĵo kaj vesto el brodita tafto. Atlasaj kravato kaj zonumo. Punt-faldaĵo.

La mansaketoj estas samkoloraj kiel la roboj. Ili estas ŝtofaĵ, garnitaj per galonplektaĵo, aŭ broditaj.

Nune koketulinio ĉiam havas florojn ĉe sia korsajo. Ili estas tiel ŝatataj, ke la elegantulinioj, kiuj timas, ke malseketaj trunketoj difektos delikatajn ŝtofojn aŭ punktojn, surmetas artefaritajn florojn perfektege imitantajn la naturajn. « Artefaritajn! Fi! Abomeno!» vi ĉiuj ekkrios, ĉu ne, amikinoj? Kaj mi respondos: « Bravisime!» ĉar mi opinias tute same, kiel nia ravega aktorino Arlette Dorgère, kiu diris: « La floroj, vivantaj ornamoj, estas pli brilaj pruntedonante sian brilon al la virino, kaj la virino estas pli alloga aldonante al sia gracieco la ĉarmon kaj la parfumon de l' floroj. », kaj kiel nia fama verkistino, Srino d'Arbonville, kiu skribis: « Parfumo de floro estas iom da idealo, iom da poezio, kiu eniĝas en la realaĵojn de la vivo.

La venontan monaton mi parolas pri niaj felaj vestaĵoj.

ROKSANO,

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.



## Mallonga korespondado.

Baldaŭ edzino. — Estas tute simpla kaj ne suferiga rimedo, por forigi viajn veruketojn. Kvin-ses fojojn dum la tago forte frotu ilin per kreto, kaj post unu-du tagoj ili falos, nur tuŝante ilin per fingro. Post la frotado lavu ilin per akvo kun vinagro, kaj, se la haŭto estas iom inflamigita, ŝmiru ĝin per vazelino.

R.



El « La Mode Parisienne », 37, Avenue de l'Opéra, Paris.  
MODELO BACHWITZ.

## Praktikaj aplikoj de Esperanto.

Katolika preĝaro, aprobita de M-ro Renou, ĉefepiskopo de Tours (Ĉe « Espero Katolika », sen prezo). — *Limigo de l' Armadoj*, de d'Estournelles de Constant (75 c. ĉe P. E. S.) — *Consell Iron Company Limited*, tre grava eldonaĵo: ĝi estas, en Esperanto, la katalogo de la feraĵoj kaj ŝtalaĵoj produktataj de la grava fabriko Consell. Tiu iniciato, ŝuldata al nia estimata amiko A. E. Wackrill, estas pleje atentinda kaj imitinda. Por la Dua Haga Konferenco, enketo de la Internacia

Instituto de Paco, trad. en Esperanton de R. Laisney kaj G. Moch (1 fr. ĉe P. E. S.). — *Lernolibro de la natura stenografio Gabelsberger*, de G. Christoffel (75 Sd. ĉe Heckers Verlag, Wolfenbüttel, Germanujo).

En « La voz de Guipuzcoa », represo hispane de l' artikolo de nia distinginda kunlaboranto D<sup>o</sup> Artigues pri *Esperanto kaj Ruĝa-Kruco*.

# Duonsurda

Duakta komedio, de ROKSANO originale verkita. (1)

## SCENO III<sup>a</sup>.

GABRIELINO, EDUARDO.

EDUARDO, ĝoje. — Bonan tagon, Flino. (Ne ekvidante Valentinon) Ĉu Valenjo ne estas ĉi tie?

GABRIELINO. — Ne, Sinjoro, mi tuj venigos ŝin.

(Ŝi eliras).

## SCENO IV<sup>a</sup>.

EDUARDO, sola.

Li zorge ekzamenas la buduaron kaj ekvidas la numeron de «*Tra la Mondo*.»

Flino Gabrielino intencas legi por ne ĝeni nian konversacion. Dankinda intenco! Sed pro la okazo se ŝi alparolus nin, kiam ni estos sidantaj ĉi tie (li montras du seĝojn), mi iomete ŝovu dekstren la geridonon, por ke mi povu ŝin aŭdi. Jen! Nun, mi metu mian bastoneton kaj mian ĉapelon sur tiun ĉi seĝon, kiu neeviteble estos la mia, kaj sekve mia dolĉulino ne apudestos mian malbenindan, maldekstran flankon... Ha! voli edziĝi, kiam oni estas duonsurda ne estas facilaĵo... Sed, mi aŭdas paŝetojn.

## SCENO V<sup>a</sup>.

EDUARDO, VALENTENINO, GABRIELINO, poste du knabetoj.

EDUARDO, rapide alpaŝante al Val. kaj etendante la manon. — Kiel vi fartas, Valenjo? Mi vin trovas pala, via maneto tremas; ĉu vi estas malsana?

VALENTENINO, penante rideti. — Ne, mia kudristino iom lacigis min provante miajn tualetojn sur mi.

EDUARDO, ameme. — Sidigu, sidigu do. (Ĉiam tenante sian manon li alkondukas ŝin al la du seĝoj).

GABRIELINO, flanken. — Jes, sinjoro Eduardo, prenu la maldekstran seĝon.

EDUARDO. — Mi malbenas tiun kudristinon, kiu paligas la tiel ĉarman vizaĝon de mia kara Valenjo. (Vidante, ke Gabrielino portus seĝon, kaj sin direktas maldekstren, li diras flanken). Dioj miaj! Dioj grandaj! Dioj bonaj! Kio mi fariĝos! Ŝi iru al la geridono!

GABRIELINO, sidante maldekstre de Eduardo kaj iom kontraŭ li. — Ne pro la provado de l' roboj, Valenjo estas pala, sed pro tio, ke oni pretendas ke, laŭ via diro, vi edziĝos kun ŝi (ŝi montras Valenjon) nur tial ke ŝi estas tre riĉa (tion ĉi dirante ŝi tuŝetas sian vizaĝon).

EDUARDO, flanken. — Ŝi tre certe diras, ke mia fianĉino estas tre bela. (Laŭle). Jes, Flino, tio estas la vera vero.

VALENTENINO. — Kiel! nur pro tio vi edziĝos kun mi?

EDUARDO. — Mi ne diris (pli laŭtigante tiujn ĉi vortojn) nur pro tio: sed mi konfesas, ke mi estis unue allogita per tio. Tamen mi rapidas aldiri, ke vi havas ankaŭ multajn aliajn meritojn, kiujn mi tre ŝatas, sed konsentu pri tio, ke la altiraĵo citita de Flino Gabrielino ne estas malŝatinda.

VALENTENINO. — Ho! Ho!

EDUARDO. — Ne ruĝigu, Valenjo; senkulpigu, ke inter miaj grandnombraj malbonaj ecoj troviĝas almenaŭ unu bona: la veramo. Mi abomenas la mensogon, kaj en kia aĵu cirkonstanco, eĉ se mia feliĉo dependus de mia respondo, mi tute ne ŝanceliĝus diri la veron.

(Oni frapas je l' pordo).

VALENTENINO. — Kiu estas tie, Gabrielino?

GABRIELINO (irinte al la pordo). — Ĝi estas du knabetoj senditaj por S<sup>ro</sup> Eduardo.

VALENTENINO. — Ili eniru.

(Eniras du knabetoj).

La du knabetoj demetas sian ĉapelon, kaj diras samtempe: Bonan tagon, gesinjoroj. Mi deziras paroli kun S<sup>ro</sup> Tokvilo.

EDUARDO, ridetante. — Ĝi estas mi. Kion vi havas por al mi diri? Sed ne parolu samtempe.

UNU KNABETO al la alia. — Mi ĝin diros, mi.

LA ALIA KNABETO. — Ne, mi.

Ili parolas samtempe. — S<sup>ro</sup> Valto, la juvelisto... (ili sin interfrapas per la kubito kaj samtempe). Silentiĝu, vi.

EDUARDO. — Ha! S<sup>ro</sup> Valto sendube ricevis la juvelojn kaj petas, ke mi iru al li.

LA DU KNABETOJ, samtempe. — Jes. Via Sinjora Moŝto.

EDUARDO. — Bone! Iru, mi vin sekvas.

LA DU KNABETOJ, samtempe. — Bonan tagon, gesinjoroj.

VALENTENINO al Gabrielino. — Elkonduku ilin, kaj donu al ili kukojn.

LA DU KNABETOJ. — Antaŭdankon, Fraŭlino. (Ili eliras kun Gabrielino).

EDUARDO. — Mi deiras. Tiel malpacienca mi estas vidi tiujn juvelojn, kiujn mi deziras senkompare belegajn.

VALENTENINO, nekontente. — Kial belegajn?

EDUARDO. — Tial ke nenio estas sufiĉe bela por vi, kara amatino. Ĝis revido kaj ĝis tre baldaŭ.

(Li kisas la manon de Valentinino kaj eliras).

## SCENO VI<sup>a</sup>.

VALENTENINO, poste FREDERIKO.

VALENTENINO, falante sur seĝon apud la geridono kaj plorante. — Fine! Mi estas sola kaj povas lasi flui libere la larmojn, kiuj sufokis min. Ploru, ploru, mia okuloj! Faciligu mian disŝiritan koron. (Plene agilita, ŝi leviĝas, marŝas, haltas, remarŝas). Kion mi faros? Ĉu mi akceptos aŭ rifuzos tiujn juvelojn (kun ironia voĉo) neniam sufiĉe belajn por mi? (Ŝi residiĝas, sin kubutapogas sur la geridono kaj frapas sur ĝin). Oni ĵurus ja, ke lia amo al mi estas kiel eble plej fidinda, kaj tamen, ne en vero, sed nur ŝajne. Mi pri tio ne povas konservi la plej etetan iluzion post liaj diroj esprimitaj kun la plej granda sincereco. Mia doto unue lin allogis; miaj aliaj meritoj — kiuj laŭ lia juĝo estas multaj — venas poste... Malriĉaj junulinoj, kiuj pli ol unufoje envias mian riĉecon, se vi sciis, kiom kompatinda mi estas!... Ne, ne, mia edziniĝo estas neebla... mia vivo estus senhalta turmento; ĉiam mi aidus tiun konfeson. (Ŝi reploras). Ho! La okuloj min doloras: kredeble ili estas tute ruĝaj. (Ŝi leviĝas kaj rigardas sin en spegulon). Se li alvenus, li nepre opinius min malbela. (Ŝi metas ion da rizpudro sur sian vizaĝon). Kial do mi volas plaĉi al li? Ĉu mi ne sciis, ke miaj ĉarmoj estas nur la dua altiraĵo. Kaj malgraŭ tio... Estas hontinde, malgraŭ tio mi sentas, ke mi lin amas, tiel same kiel antaŭe.

(Eniras Frederiko, kiu lion aŭdante haltas).

FREDERIKO, flanken. — Kion ŝi diras? Kion ŝi sciis? kiu faris maldiskretaĵon?

VALENTENINO. — Malforta kaj senenergia virino! kie do estas via fiereco? Kion dirus miaj amikinoj, se tion ili eksciis? Tute prave ili mokus min.

FREDERIKO, flanken. — Malfeliĉa Eduardo! Via sekreto tiel zorge kaŝita estas nun plej eble malkaŝita; kaj kiel vi konjektis, ŝi timas la mokojn de siaj amikinoj. Kiu maldelikatulo tiel detruis ilian feliĉon? Se mi ĝin tenus, vere, ĝi ne sentus malvarmon ĉe siaj oreloj.

VALENTENINO. — Kiaj netolereblaj korbatoj! (Ŝi falas sur kanapon, kvazaŭ ŝi svenus).

FREDERIKO, enirante kaj kriante. — Ĉu estas eble! meti sin en tian staton pro neniaĵo!

VALENTENINO, rekonsciigante. — Pro neniaĵo!

FREDERIKO. — Jes, pro neniaĵo, mi konfirmas mian diron, kaj mi vin juĝis pli inteligenta, ol vi estas; mi neniam estus kredinta, ke vi estas el tiuj virinoj kun mallarĝa cerbo.

VALENTENINO. — Tro flatema, kuzo.

FREDERIKO. — Tion, kaj pli multe vi meritias. (Ekvidante sur la geridono naztikon tute malsekiĝitan). Al vi estas tiu ĉi naztuko? (Mokeme). Pro tio vi ploras? (Li plialtigas la ŝultrojn). Nu! Valentinino, vi ne estas pardonebla.

VALENTENINO. — Se vi opinias, ke mi ne havas motivon por plori, eĉ ploradi.

FREDERIKO. — Certe, jes, mi tiel opinias.

(1) Sekvo kaj fino. Vidu la Aŭgustan-Septembran numeron.

VALENTENINO, *kolere*. — Vi ĵus parolis pri virinoj kun mallarĝa cerbo, sed mi pliamas esti tia, ol, kiel vi ambaŭ, esti mallarĝkora.

FREDERIKO, *senpasiĉe*. — La kolero konfuzigas vian kapon, mia kara kuzino. Ja, mi vane cerbumas por kompreni, kiel viro kun mallarĝa koro rilatas al... kiel mi diros... al la malagrablajeto... al la malĉarmeto de mia bona Eduardo.

VALENTENINO, *scivoleme*. — La malagrablajeto? La malĉarmeto? Ĉu via kapo ankaŭ ne konfuziĝas, mia kara kuzo?

FREDERIKO, *flanken*. — Kion mi diris? Ĉu ŝi nenion scias? Sed kial do ŝi ploris? Mi estu singarda. (*Laiĉte*). Mian fidon, vi frenezigus la plej fortikan viron per viaj senkaŭzaj plendoj; tial, ĉar mi tute ne deziras iri en frenezulejon, mi vin lasas, kaj mi alportigos al vi kelkajn dekduojn da naztukoj.

VALENTENINO, *kurante, por malhelpi lian eliron*. — Ne foriru, Frederiko; klarigu tion, kio estas la malĉarmeto de Eduardo.

FREDERIKO, *grandpase irante al la pordo*. — Pli malfrue, pli malfrue. Mi ne volas frenezigi, mi diris. Adiaŭ, *(la infano)*.  
(*Li eliras*).

VALENTENINO. — Nu! Mi havas nun plian motivaĵon por maltrankviliĝi. Mia fianĉo havas malĉarmeton... Tamen estas nekontraŭdireble, ke li estas la plej bela el ĉiuj. Kion do li havas? Tre ofte mi atente ekzamenis lin, kaj nenion rimarkis. Malbona Frederiko, kion vi ekdiris al scivolema filino de Evo? Kiu eldiros al mi tiun sekreton? Komprenoble, mi ne povas direkti min al ĉiuj liaj amikoj kaj demandi: « Ĉu vi volas fari al mi la servon diri, kia estas la malĉarmeto de S<sup>ro</sup> Tokvilo? » Tiaj klopodoj estus ridindaj... sed... sed... Beninda ideo ĵus venis en mian kapon. Kiam li parolis — ho ve! ho ve! ho ve! ĝis morgaŭ, ho ve! — pri sia ŝatego al mia doto, li aldiris: « En kia ajn cirkonstanco, eĉ se mia feliĉo dependus de mia respondo, mi ne ŝanceliĝus diri la veron ». Nu! de li mi petos la klarigon de l' diro de Frederiko. Li venu baldaŭ, tre baldaŭ, ĉar mi tiel varmege deziras tion ekscii, ke mi ne povas resti senmove; ŝajnas al mi, kvazaŭ mi estus sur pikiloj. (*Ŝi iras al la spegulo, aranĝas sian hararon*).  
(*Eduardo frapas je l' pordo kaj eniras*).

## SCENO VII.

VALENTENINO, EDUARDO, poste FREDERIKO  
kaj GABRINJO.

EDUARDO, *gaje*. — Ha! mi vin surprizas, koketulinino. Ĉu vi demandas al via spegulo, ĉu via feliĉa fianĉo rajtas vin trovi la plej bela? Sed vi scias, ĉu ne, Valenjo, ke mi multe fieriĝas pro tio, ke mi havas tiel ĉarman fianĉinon.

VALENTENINO, *flanken*. — Pli beligitan de ŝia doto. (*Laiĉte*). Ne, mi ne tion scias.

EDUARDO, *ridetante*. — Malbona incitetulinino!... Sed ni ne habladu. La juvelisto estas en la salono kun via patrino; ili nin atendas; venu do.

VALENTENINO. — Antaŭe, mi havas ion por demandi al vi.

EDUARDO, *ameme inciteta*. — Kion? Ĉu mia koro estas via? Ĉu mia animo estas via posedaĵo? Ĉu mia vivo apartenas al vi?

VALENTENINO, *flanken*. — Nun mi ne kuraĝas lin demandi pri tio. (*Laiĉte*). Ni sidigu. (*Ŝi sidigas*).

EDUARDO, *flanken*. — Ve! ŝi elektas la malbonan flankon. (*Laiĉte, kareseme*). Valenjo, permesu ke mi sidigu maldekstre de vi?

VALENTENINO, *malfermegante la okulojn*. — Kial?

EDUARDO, *ĉiam kareseme*. — Por esti apud via koreto, kies batojn pro mia ĉesto mi kredas aŭdi. (*Ŝi levigas. Ŝi sidigas*).

EDUARDO. — Mi atendas vian demandon, kara.

VALENTENINO. — Frederiko diris al mi... (*ŝi tusetas*).

EDUARDO. — Kion?

VALENTENINO. — Li diris...

EDUARDO, *flanken kaj ekstremante*. — Ĉu li min perfidis? (*Laiĉte*). Tio estas do tre malfacile eldirebla?

VALENTENINO. — Ne, sed...

EDUARDO, *flanken kaj paliĝante*. — Ŝi sciigis mian surdecon. (*Laiĉte*). Mi ne povas kompreni vian timemon, Valenjo?

VALENTENINO. — Vi estas prava; vere, mi estas tute malŝprita. (*Kuraĝiĝante kaj rapide parolante*). Li diris, ke vi havas malĉarmeton, kaj kiam mi petis pri klarigo, li forkuris. Ĉar mi scias, ke vi ĉiam diras la veron, mi demandas al vi: « Kia estas tiu malĉarmeto? »

EDUARDO, *prenante sian manon*. — Valenjo, mi travivas la plej doloran momenton de mia vivo, tiel multe mi timas, ke mi plu neniam tenos tiun ĉi grandvaloran manon.

VALENTENINO, *melante la alian manon sur sian koron*. — Mi tremas. Kion vi tuj konfesos al mi?

EDUARDO. — Antaŭ ĉio, permesu, ke mi senkulpigu mian konduton, kiun eble vi opinios nepardonebla. Sed tion mi kaŝis al vi pro la timo, ke vi eble min rifuzos kiel edzon: kaj mi vin amas tiel sincere, Valentenino, ke se mi vin perdus, mi restus ĉiam nekonsolebla.

VALENTENINO. — Tamen vi facile trovus alian riĉan junulinon.

EDUARDO. — Riĉan? Sed mia propra riĉeco permesas ja, ke mi edziĝu kun malriĉa fraŭlino.

VALENTENINO. — Vi ne ĉiam diris tiel.

EDUARDO, *pli kaj pli mirante*. — Kiam.

VALENTENINO. — Hodiaŭ mem.

EDUARDO, *saltegante*. — Hodiaŭ? Al kiu do?

VALENTENINO. — Al Gabrielino kaj al mi.

EDUARDO. — Al vi? Tio estas absolute neebla. Precizigu, pro kompato; ĉar vi faras el mi la plej malfeliĉa el la viroj.

VALENTENINO. — Kiel vi faris el mi la plej malfeliĉa el la virinoj.

EDUARDO. — La plej malfeliĉa! Ho! En ĉi tio estas malkompreniĝo.

VALENTENINO. — Tute ne; ĉar vi jesis, kiam Gabrielino diris, ke vi estis certiginta, ke vi edziĝos kun mi nur pro mia doto.

EDUARDO, *malĝoje*. — Ha! Mi nun memoras pri via miro, kompatinda karulino. Nu! Mi tuj diros tion, kio estas mia malĉarmeto — kiel vi ĝin nomas — kaj se mi perdos vian amon, almenaŭ al mi restos via estimo.

VALENTENINO, *tremante*. — Eble estus preferinde, se tion mi ne eksciis.

EDUARDO, *kuraĝe*. — Valentenino, mi estas surda je la maldekstra orelo. Kiam Filino Gabrielino parolis, mi ne ŝin aŭdis, kaj el ŝiaj gestoj mi komprenis, ke ŝi diris, ke vi estas tre bela.

VALENTENINO, *ĝoje*. — Surda, surda je unu orelo! Kia feliĉo!

EDUARDO. — Kia feliĉo?

VALENTENINO. — Jes, ĉar de nun mi ne dubas pri la sincereco de via amo; kaj nun estas klarigita por mi la kolero de Frederiko, kiam li diris: « Vi estas virino kun mallarĝa cerbo: vi ploras pro neniaĵo ».

EDUARDO. — Vi do ploris?

VALENTENINO. — Jes, pro mia doto.

EDUARDO. — Kaj nun, pro mia... malĉarmeto, ĉu vi ne ploras?

VALENTENINO, *ameme*. — Ne, amata fianĉo. (*Malice*). Eĉ mi ĝojas pri tio, ĉar en la daŭro de mia kunestado, kiam lafoje — ho! tre, tre malofte, espereble — kiam ni kolektos unu pri la alia, mi min metas apud la neaŭdantan oreleon, kaj mi senĝene diros ĉiujn malamindaĵojn, kiujn mi volos.

EDUARDO, *feliĉe*. — Ho! Bonkora Valenjo, mi vin adoras ĝenu.

VALENTENINO. — Ĉiam?

EDUARDO. — Jes, ĉiam pli kaj pli.

FREDERIKO, *kiu de momento estas malantaŭ la kanapo sur kiu sidas la gefianĉoj, krias en la orelo de Valenjo*: Kukolo!

VALENTENINO, *saltegiĝante*. — Fi! Malbonulo, vi min timigis.

FREDERIKO, *inciteta*. — Kaj mi interrompis la dolĉajn amikonfesojn, ĉu ne, kara ploremulinino?

EDUARDO, *gaje*. — Ŝi jam ne ploras.

VALENTENINO. — Dank' al vi, kuzo, kiu ekparolante pri la malĉarmeto de Eduardo devigis, ke li tion klarigu al mi.

FREDERIKO, *prenante la manon de Eduardo*. — Mi varme vin gratulas pro via kuraĝo, amiko. Do, de nun, neniom da timoj.

VALENTENINO. — Kaj neniom da ploroj. Nur ĝojoj kaj feliĉo.

GABRIELINO, *enirante*. — Espereble en tiuj ĉi ĝojoj estos kelkaj por mi?

VALENTENINO. — Jes, kvankam vi plorigis min.

GABRIELINO. — Mi?

VALENTENINO. — Ho! senintence, mi estas certa. (*Frapante sur sian fronton*). Kiaj gesencerbuloj ni estas! Ni tute forgesis, ke Sinjoro Valto nin atendas en la salono. Mi tuj iru elekti la juvelojn. Kiu min amas, tiu min sekvas.

La kurteno falas.

FINO.

ROKSANO.

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.

## Kristnaska rakonto pri blinduloj.

De Doktoro R. I. KRONBAUER, Bohema aŭtoro.

D<sup>RO</sup> R. I. KRONBAUER,  
bohema verkisto.

Kelkajn tagojn antaŭ la kristnaska festo de la pasinta jaro mi ricevis malgrandan libreton. « Versaĵoj de la blinda knabino Maria Wöfl, zorgatino en la porblindula instituto de Klár », mi legis sur la unua paĝo de simple kaj malmultekoste ordigita kajero. Mi tralegas paĝon post paĝo, unu versaĵon post la alia, kaj mi ree rigardas la titolon, kaj ree tralegas malgajan sopiron de blinda poetino:

Ne admiru, ke mi tro suferas,  
Sopirante je la lasta horo,  
Kiel varmaj larmoj tuj aperas,  
Kion kaŝas mia ĵuna koro.  
Ne demandu, ankaŭ suferantaj,  
Liaŭ egala sort', kunuloj m'aj!  
Ĉar la tempoj venos, kaj jlorantaj  
Ĝistos certe, ja, okuloj viaj!

La malgajeco fluas el ĉiuj versoj. Mi vidas la animon de la kompatinda suferantino antaŭ mi, kiel ĝi penas, kaj serĉas la komparankoloron, kaj kiel la doloro paŝas kun ŝi, kiam ŝi iras al la fonteto de sia verkado, sin apogante je la bastono. Mi vidas ŝin, enirantan en la naturon: maro da floroj pendas super ŝia kapo, kaj ŝi, dolorplena, akceptas iliajn odorajn salutojn, ekĝemas sopiron, grandan, varman, vanan sopiron, per la bastono ĉirkaŭpalpas, rompas, kaj pereigas la florojn, aŭskultas, aŭskultas voĉojn kaj venteton, revenas kaj kantas pri tio, kiel « la varma venteto blovas, lulante la florojn, kaj rapide malaperas, kisante ilin dum la blovo ». Mi vidas ŝian malgajan, rompitan animon, kiam ŝi ekplendas:

Ĉiu flor' aliĝas al floro,  
Amo amon vekas kaj promesas,  
Ĉiu kor' alvolvas sin al koro,  
Mi nur ĉiam plendi, ho, ne ĉesas.

Nenio, sen kisoj de ora suneto,  
Nek arboj, nek floroj, nek ĉarmoj!  
Doloron eksentas nur mia koreto,  
Sur palaj vangoj, jen larmoj.

Kaj kio nur estas por mi la suneto,  
Kaj arboj kaj ĉiu, ja, floro,  
Se mia mortadas malsana koreto,  
En kiu rigadas doloro.

Mi ne povis disiĝi de la libreto. Kien ajn mi iris, ĉien kaj ĉien kiel ombro sekvadis min la malgajeco de tiu soifanta kaj malsata animo.

Ankoraŭ la saman tagon mi ricevis tradukon de novelo, rakontanta pri amo de blinda knabino. Denove mi malfermis la kajeron, kaj tralegis versaĵeton « Derelikta »:

Jen aŭtuno! Vent' malvarme blovas,  
Porportante folieton ĉarman  
Kruĉe de la malfeliĉa floro,  
Kiel Vian koron, nun malvarman.

Kion mi eksentas el tiuj dolorplenaj linioj? Por ĉio estis en ŝia animo tiom da maloftaj semoj, kiuj

fendiĝis, ekĝermis, sed ne ekradikigis trunketon, burĝonon, floron.

Kiel per la vintra frosto, kruda,  
Mortas ĉiu, eĉ la lasta floro,  
Tiel velkas, kara amatulo,  
Mia kor' per Via malfavoro.  
Ĉar folioj estas forblovitaj, velkis  
Sur vangetoj miaj floro;  
Ke mi iam, knabo, Vin ekkonis,  
Mi bedaŭras ĝis ĉi tiu horo!

Naskiĝis en mi deziro vidi, koni la kapon de tiu, kiu ne vidis florojn, sed tamen sciis ilin elpentri. Estis malgaje kaj maltrankvile en la naturo en tiu tago, kies vespero estis lumigota per kristnaskaj lumetoj.

En la stratoj faladis nebuloj, kvazaŭ intencantaj peli la homojn en sekretajn, familiajn loĝejojn. Mi sonorigis apud pordego de la blindulejo, kaj petis anonci mian viziton al la direktoro. Mi staris en vestiblo tute malluma. Iu lumigis, kaj mi rimarkis sur muro dediĉan versaĵon de Antonín Klášterský per grandaj literoj skribitan:

Kiel Milton',

Blindigita de Dio perditan paradizon retrovis  
En laboro sia, tiel eĉ ni fortigas niajn brustojn  
Kaj manojn niajn, ĝis sur niaj lipoj ekĝemo  
Mallautiĝas, kaj doloro finiĝas en la koro:  
Ho, kiu eniras, Vin Dio ŝirnu kontraŭ la malbono;  
Jen vidu, kio al Viaj fratoj malfeliĉaj donita estas  
Por ilia savo: kiel laboro, granda konsolo en plendo  
Homara, perditan al ni redonas paradizon!

Poste oni alkondukis min al la direktoro, al kiu mi prezentis mian peton, vidi plezure la blindan poetinon. « Ŝin vi jam ne povas vidi, iris la direktoro, nia poetino jam mortis. »

Mi prenas ree kajeron de ŝiaj versaĵoj, kaj tralegas ŝian propran epitafon:

Jen malalta, forlasita tute,  
Ĝa tombo, ho, sen iu flor';  
Ĝi al vi pri mi rakontos mute:  
Pacon tie trovis ŝia kor'.

Ja, mi trovis, kion vane ĉiam  
Mi serĉadis dum vivada voj',  
Kie, ho, por mia kor' neniam  
Floris, dolĉa l' amo, vera ĝoj'.

Ĝis ĉi tie dormos mi agrable,  
Ĉu Li plendos kiam en dezir',  
Iri al malalta tomb' afable.  
Ĉu Li memoros en sopir'.

Jam ne ian lumeton ŝi povis vidi — malfeliĉa animeto.

La direktoro afable invitis min, ke mi vizitu la instituton. Estis ĉi tie moyplena vivo. Post kelkaj momentoj ekbrulos kandeletoj sur kristnaska abieto, sub kiu kuŝos donacoj por ĉiu zorgato. Ĉiuj rondstaros ĉirkaŭ ĝi. Oni gvidis min en malgrandan ĉambron, kie, en angulo, sidis maljunulo blindiĝinta antaŭ kvardek jaroj.

Vivplena, parolema maljunulo! Li rakontis kiel sub marŝalo Radecký li bataladis en Italujo; lia voĉo laŭte sonis, sed iom post iom plimallaŭtiĝis.

Li prenis miajn manojn, kaj per voĉo dolora diris: «Sinjoro!. De kvardek jaroj mi jam ne vidas la lumon de Dio. Post kelkaj momentoj vi iros al la abieto; se oni ne kredus al Dio, oni ne povus hodiaŭ esti ĝoja: oni devus maldolĉe plendi. Jus, kiam vi eniris, mi pripensis la mortiginton de ŝia reĝina Moŝto. Sinjoro, kredu al mi, krom mia konscienco, mi devus lin envii. Jes, sinjoro... rigardu... De kvardek jaroj mi sidas ĉi tie mem, kva-zaŭ en tombaj mallumoj; nenion mi faris, kaj tiel multe mi suferas! Se estus eble, elpreni okulojn de tiu homo, kaj doni ilin al mi... Tio estus, sinjoro, vera justeco. Mi pensas tion alie, ol mi diras; por ke vi komprenu min, sinjoro, mi ne pensas, ke tio devus efektiviĝi; sed tio venis en mian penson, tial ke post momento ĉie ekbrulos lumoj, kaj eĉ ĉe ni, sur la tuta mondo, kaj ni solaj ne povas vidi ilin. Mi diris, se la homo ne kredus al Dio, maldolĉe, krude li devus paroli en tiu ĉi momento, kiam ĉiuj homoj ĝojas kaj plezurhavas... Mi estas maljuna, sinjoro, maljuna, tre maljuna... nun tio ne povas ankoraŭ longe daŭri, kaj mi tamen nur grandan lumon vidos.»

La maljunuleto prenis miajn manojn, rapide ilin premis, kaj lia voĉo ŝanceliĝis kaj moviĝis per korduŝo. Mallumo estis en la ĉambreto... la maljunuleto alklinigis sian kapon al la mia, kaj mi vidis sur lia vizaĝo lumi ion grandan.

Perlargaj, oportunaj sed mallumaj ŝtupoj, ni iradas en la ĉeflaborejon de l' blinduloj, en la korbfaradejon. Mi ne lumigas, diris la direktoro, niaj gezorgatoj ne bezonas lumon. Mi eniris longan ĉambron, kie la blinduloj el branĉetoj faras ĉarmajn, perfekte laboritajn objektojn. La laboro estis finita. Nur malgranda lumo avare lumigis parton de tiu aminde varmigita ĉambro. Malantaŭe mi vidis viron, eble kvardekjaran; ĉirkaŭ li sidas proksimume dekdu junaj blinduloj. Tiu ĉi maljuna viro havis signifan, spritan vizaĝon. «Ne salutu», diris al mi la direktoro, kaj atente ni paŝis antaŭen. Mi sekvis lin. Mi vidis kapojn de junuloj, alklinitaj al tiu de ilia malpli juna kunulo, kiu per klara kaj belsona voĉo parolis: «Poste ni iros supren al kristnaska abieto. Tio estas bela. Ĝis hodiaŭ mi vidis lumigitan abieton, kvankam pli ol dudek jaroj jam pasis, de kiam mi vidis ĝin je la lasta fojo. Centoj da lumoj brulas... la kandeletoj staras sur la branĉetoj kiel kaŝtanfloroj. Oraj kaj arĝentaj katenoj estas traplektitaj tra la arbo, sur kies supro balanciĝas anĝelete. Ĝis ni estos apud la abieto, primemoru viajn patrinojn, patron, fratetojn kaj fratinetojn, ili memoras pri vi ankaŭ, kaj estas al ili helpo, ke troviĝis bonaj, bonkoraj homoj, kiuj ne forgesis vin en tiu ĉi bela horo. Ne plendu, ke vi ne vidas la lumojn... la okulo estas granda aĵo, sed ne estas la plej grava. Pura konscienco vi havas ĉiuj, kaj tio estas la ĉefa... Ĉu vi memoras, kion diradis la pastro,

ke pura konscienco estas kiel granda lampo en homa animo.. Ĉie estas lumo kaj nenie ombro, la homo estas ĝoja kaj libera. Tion primemoru, ĝis ni supreniros. Tiel estos al vi pli bone kaj pli ĝoje, via doloro estos malpli granda ol la mia. Mi vidis, mi memoras, sunon, lumon kaj stelojn. Kiom mi donus por tio, se mi ankoraŭ unufoje vidus la sunon aŭ la ĉielon, kiam ĝi estas plena je steloj. La mondo estas io granda. Vidi kamparon en tempo de floroj, vidi malantaŭe arbarojn, kaj montojn, super ili bluan ĉielon... tio estas tiom bela, ke mi ne povus rakonti al vi pri tio, se mi dum milo da noktoj rakontus. Sur tero ĉio bluiĝas, super la kapo floroj pendas, flugas koloraj birdoj, ĉio estas samkolora. Ankoraŭ ĉion mi vidas... ĉion mi memoras... sed jam nur kiel en nebuloj... mi forgesas... mi forgesas... mi eble iam tute forgesos... Sed ruĝajn florojn de papavo mi ĝis hodiaŭ klare vidas... Kiam la suno brilas, eĉ la okuloj doloras de ĝia koloro. Iam mi vidis tutan kampon, kovritan per papavaj floroj... kiel kiam sango estas elverŝita. Tion mi ankaŭ ĉiam vidas, kaj ofte primemoras la tempon, kiam mi tion vidis. Ŝajnas al mi, tiam esti vidulo... Plej bele estas en kamparo printempe kaj vintre. Ĉio estas blanka kiel tolo. Printempe same; la arboj ŝajnas kovritaj per

dissemita sukero. Tio estas la plej granda festeno de la naturo. Ĉiu floro havas sian vivon. Ĝi forfalas kaj la frukto anstataŭas ĝin. Ĉiu pometo, kiun vi mangas, antaŭe estis floro. Vi rakontis antaŭe, Vaŝjo, ke vi sonĝis... esti vidanta..., rakontu, kion vi sonĝis... »

« Mi estis, ŝajne, enfermita en ŝtonego » diris juna blinduleto... « mi eliris de tie, mi aŭdis sonorilojn, kaj

branĉetoj mi plektas korbetojn. La birdoj kantis, kaj knabinoj, laŭrondigitaj sin, ankaŭ kantis. Mi vidis ilin ankaŭ..., mi sidigis proksime de la rivereto, ordigis korbetojn kaj vokis la knabinojn. Ili alveninte forprenis la korbetojn, sed min neniu el ili atentis. Tro doloris min... kaj mi ekplendis... »

« Aŭdu, aŭdu, kvietigante lin diris la maljuna blindulo, kiu atente aŭskultis, nun mi alvenas al tio, kion mi intencis diri al vi. Pli bone, tre bone estas, ke vi ne vidis lumon. Por mi estas pli malbone, tre malbone; mi plendas, kaj vi havas nenion por plendi pri tio. Kiam mi rakontas al vi pri tio, kion mi iam vidis... mia koro batas, sed vi estas kiel infanoj, al kiuj avino rakontas fabelon pri oraj pomoj kaj parolantaj birdoj... Ekzistas nek oraj pomoj nek parolantaj birdoj... kaj la infanoj ĝin ne bedaŭras tiom, kiom ili bedaŭrus, se tio ekzistus... Mi rakontis al vi ankaŭ fabelon... vi ne vidis la lumon, kaj tial vi ne estas kaj ne estos maltrankvilaj kaj malgajaj. Tio estas por vi, kiel por infanoj: ne ekzistas oraj pomoj... kaj se ĝi ekzistas por aliaj... tion ne pripensu. Ekzistas ankoraŭ aliaj ĝojoj kaj alia feliĉo, ne nur la plézuro kaj feliĉo devenantaj de lumoj... »



ORĤESTRO DE BLINDULOJ.



Morgaŭ ni kantos, ridos, kaj estas eble, ke multaj el tiuj, kiuj vidas, envios vin, vin aŭdante... »

Ni senbrue foriris. Ankoraŭ en la pordo, mi turnis min. Mi vidis ankoraŭ la kapojn de la junaj blinduloj kliniĝintajn al tiu de ilia maljuna rakontanto.

Poste ni vizitis la instruiston de la geblinduloj. Mi vidis fortan, seriozan viron, kies voĉo mirinde dolĉe kaj aminde sonis. Granda, senlima, sankta suferemeco vidigis sur lia vizaĝo. Oni rakontis al mi pri li, ke li mem estas muzikverkisto, kaj la fakaj konantoj konsentas, ke tiu viro koncerne sian fakon estas artisto — kreanto de vera kaj pura arto. Li montris al mi lernilojn, relieffajn, geografiajn kartojn, terglobojn, kalkulilon, librojn, notojn kaj mi surprizplene aŭskultis lian amindan klarigon, kaj komprenis, kial kaj kiel estas eble, ke homoj, per tia malfeliĉo frapitaj, povas forgesi sian malfeliĉon, krudan malaperon el ĉiuj ne difineblaj bonfaroj, kiujn prezentas la vivo. Kiam li prenis la karton kaj diris multon da nomoj, kaj ilian geografiajn situacion precize difinis; kiam mi pripensis, *ke la blindulo instruas blindulojn*; kaj kiam lia dolĉa voĉo — plena je resignacio kaj turmento de propra suferado purigita per la kompato al proksimulo, — tiel indulgeme, afable, kaj fervore sonis, mia interna voĉo min atentigis, ke antaŭ mi staras homo, kies animo estas granda, konsenta, kaj pri sia sorto kontenta, vivanta dediĉinte sin sole al sia malfacila kaj responda profesio. Anime mi vidis lin ĉirkaŭatan de liaj blindaj gelnantoj, kaj ŝajnis al mi, kvazaŭ de l' kapo de ilia instruisto devenus lumo kaj varmo, kiuj ĉiujn al li tenas kaj ligas, kaj kiuj estas ĉefaj partoj en la vico da penadoj kaj sopiroj naskintaj la verkojn, pri kiuj ni miregas kaj parolas kiel pri mirakloj. Ni vidas la geblindulojn lerte legi librojn, kiujn malmulte da homoj vidas kaj konas, ni vidas ilin skribantajn, laŭ notoj ludantajn, ni, plenaj je miro rigardas tiujn, kiuj ellaboras etajn objektojn tiel perfekte kaj tiel sendifekte, ke fakaj majstroj pli bone tion ne povus fari, ni ekmeditas vidante librojn skribitajn de blinduloj kaj poste, kiam ni rigardas ilin, kiel senfortaj ili estas, kiel ili palpas ĉirkaŭ ni, kiel ili ĉion provas per la manoj, ni pripensas nin mem, multajn vidulojn, kaj maldolĉa plendo aŭdiĝas: la scio, ke la plimulto el la homoj similas al tiuj, kiujn koncernas la vortoj de l' Sankta Skribo, ke ili la ricevitajn talentojn nur tiom eluzis, ke oni ne povu diri, ke ili estis enfositaj. Kaj kiam mi vidis la altan staturon de la instruisto de l' blinduloj, Sinjoro Macan, malaperantan en la mallumo, ŝajnis al mi, ke ĉio, kion mi faris, estas malgranda, malsufiĉa; kaj nova forto, nova kuraĝo pli energia, volo soifanta je agoj naskiĝis je tiu ĉi momento en mia animo.



KAREL E. MACAN,  
profesoro en la blindulejo  
de Klár en Praha,  
kaj propagandanto de Esperanto  
inter bohemiaj geblinduloj.



Ni vizitis ankaŭ la virinan apartigejon. Ĉie jam dormis la laboro. Ĉio ekscite atendis la proksimiĝantan momenton. Kelkaj knabinoj skribis per la literoj de Klein. Kiam mi enpaŝis la koridoron, mi aŭdis la sonon de orgeno. La direktoro enkondukis min en malgrandan ĉambron, kie estis nenio krom la orgeno. Knabino ludis kanton: « Dio, antaŭ Via majesteco ni fleksas genuojn... »

La kapo de la knabino estis ekscite levita. Ni atendis, ĝis la knabino ĉesis ludi. Ŝi preteriris nin. Ŝia korpo estis belkreska, ŝia vizaĝo regula kaj ĉarma, fervorplena.

« Vi certe ĝojas pro la abiĉto, ĉu ne vere? » mi demandis ŝin.

« Jes, sinjoro, mi tre ĝojas, » entuziasme respondis la knabino, « jam baldaŭ ni vidos ĝin. »

Kaj mi demandas, kiam ŝi blindiĝis. Per malĝoja voĉo ŝi respondas, ke ŝi estis nur dujara. Ŝi tre sin interesas pri muziko, pri kiu ni ekinterparolas, kaj mi rimarkas, ke ŝi havas kolorplenajn esprimojn, kaj ke en la ĝardeneto de ŝia animo kreskas floroj, ĝermitaj semoj, kiujn semis la instruisto; kaj kiam — nur Dio scias kial — mi demandis al ŝi (mi opinias kaj senkulpiĝas, ke pri tio mi demandis nur por esplori la misteron, kiu igas la animon vigla) kiel ŝi divenos mian aĝon, ĉu mi estas juna aŭ maljuna? enpensiĝis la blinda, ĉarma knabino, kaj diris per agrabla voĉo: « Sinjoro, vi jam ne estas juna. »

« Kiom da jaroj mi havas laŭ via opinio? »

« Ŝajne kvardek. »

« Laŭ kio vi tiel juĝas? Mi plezure ekscius, kiamaniere vi alvenis al tiu prijuĝo? »

« Laŭ la voĉo mi tion ekkonas, sinjoro, via voĉo jam ne estas freŝa, ĝi velkiĝas... »

Neniu diris tion al mi tiel certe. Mi mem tiel sincere pri tio nesciis!

Kiam ni eniris denove la koridoron, ĝi estis plena je gezorgatoj. Ĉiuj rapide paŝis la halon, kie post momento ekbrulos la kristnaska arbeto.

Mi vidis pli ol centon da geblinduloj. Ĉiuj havis la kapon ekscite levitan, kiel tiuj junaj blinduloj, kiuj aŭskultis sian maljunan kunulon. La lumo flamis sur la arbo kiel en fajrujo... Ĉiuj rigardis ĝin..., en tiu momento aŭskultis ĝian kristnaskan rakonton... Ĉiuj estis ekscititaj, kortuŝitaj, kaj iliaj lipoj moviĝis. La lumoj brilis...; super la branĉetoj balanciĝis anĝelo kun granda ora stelo, kaj la blinduloj tiam... *vidis la lumon.*

El la bohema gazeto « Máj »,  
tradukis laŭ permeso de l' aŭtoro,  
V. RIEGEL.

### Propagando kaj lingvaj demandoj.

*Nauŝlingva etimologia leksikono* de L. Bastien, tre interesa verko, utila por montri la internaciecon de Esperanto, do bonega propagandilo; tre taŭga ankaŭ kiel memoriilo por tiuj, kiuj jam konas la latinan lingvon aŭ aliajn; tre ŝatinda, fine, de la profesoroj, al kiuj ĝiliveras rimedon, por kvietigi la sciemon de siaj lernantoj, kaj por intermiksi sian instruadon per interesaj komparoj (3 fr. 30 afr. ĉe P. E. S.)

*An international language* (24 sd. ĉe Review of Reviews), *Solvo de la problemo de la lingvo internacia* (sen prezo ĉe Möller & Borel), *Cu unu lingvo internacia aŭ tri?* de Prof. Louis Couturat (10 sd. ĉe la samaj), *Pri la elparolado de Esperanto*, de Gaston Moch (40 sd. ĉe la librairie de l' Esperanto). — *Fundamento de Esperanto*, (0,40 sm. ĉe Hachette k. k.) eldono greka. Ĝis nun ekzistis nur la internacia kvinlingva edono. Ni esperu, ke oni verkos multajn naciajn eldonojn, por faciligi la disvastigon de Esperanto en ĉiuj landoj. — Tria eldono de l' bonega *Esperantista Societaro* (konsulejoj, societoj kaj gazetoj), rekomendinda al ĉiuj propagandistoj (0,60 sm. ĉe E. C. O.). — *Sesa kajero de Grand dictionnaire Français-Esperanto*, kiu daŭrigas senhalte sian aperon (de *atteindre ĝis avocai*): subskriba prezo, 30 fr. (28 fr. kontante).

Tre bona angla propagandilo estas la broŝuro « The Third Esperanto Congress » kun 32 ilustraĵoj, eldonita de nia amiko Jan Wilson (75 c. ĉe B. E. A.)

*Doce lecciones del idioma internacional auxiliar Esperanto*. Tiu verko, eldonita de la grupo esp. de Montevideo estos tre utila por niaj amikoj de Urugvajo. (50 centavos: Libreria moderna Sarandi, 240, Montevideo).

*Esperanto Manuel*, de Gabriel Chavet kaj Georges Warnier, 2<sup>e</sup> édition revue & corrigée (1 fr. Librairie de l' Esperanto).

*Die Weltsprachen — Bewegung vor dem Forum Sachverständiger kritik*, de Dr. W. Borgius (40 Sd. ĉe Th. Hoffmann, Berlin W.35) *Les nouvelles langues internationales*, de L. Couturat & L. Leau (2,50 fr.), ĉe Sr L. Couturat 7, Rue Pierre Nicole, Paris.

### Muzikajoj.

*Esperantista Kantaro* (13 kantoj), originalaj aŭ esperantigitaj por 4 voĉoj miksitaj, ĉe Karl Jost, Zürich (Svisujo): 40 Sd. — *Esperantista Kantaro* (kolekto unua), esp. de L. E. Meier, ĉe Th. Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzerstr. 44: 60 Sd. — *Valso esperantista*, de Dario Saavedra, sama librejo: 64 Sd. — *La gaja Migranto*, poezio de L. Zamenhof, muz. de Charles B. Mabon, 144 Berkeley Str. Glasgow: 24 Sd. ĉe Hachette k. K.: *La Vojo*, la bela konata himno de Dr. Zamenhof, kun muziko de René Deshayes: 14 Sd. — *Himno al Zamenhof*, poemo kaj muziko de R. Deshayes: 40 Sd. — *La Kanto de l' Cigno*, traduko de S. Sviridov, muz. de F. de Ménéil: 24 Sd. — *Esperanta Valso* de A. F. de Ménéil: 24 Sd. — *Vivu la Reĝ' al ni*, angla nacia himno tradukita de Dr. Zamenhof: 14 Sd.

## AMUZAĴOJ.

### Solvoj de l' problemoj (4<sup>a</sup> Kvaronjaro).

**PROBLEMO 24<sup>a</sup>** ci-doni-pomo = cidonipomo.

**PROBLEMO 25<sup>a</sup>** nuko-duko, muko, kuko, fuko, suko, tuko, juko, buko.

**PROBLEMO 26<sup>a</sup>**

P  
B O U R I E T  
O  
Z  
A  
J  
O S T R O V S K I  
J

**PROBLEMO 27<sup>a</sup>**

Ŝ A F I N  
A V I N  
F I N  
I N  
N

**PROBLEMO 28<sup>a</sup>** Turninte la bildon, la kapo malsupren, oni vidas la solvon

**PROBLEMO 29<sup>a</sup>** kal' kul' = kalkul

**PROBLEMO 30<sup>a</sup>** mufo — muĝo — muko — mulo — muro — mumo — muso — muŝo — muto — muzo

kaj multaj aliaj serioj

**PROBLEMO 31<sup>a</sup>** kolonianoj

**PROBLEMO 32<sup>a</sup>** mus' — kol'

**PROBLEMO 33<sup>a</sup>** mus' — kat'

Divenis ĉiujn problemojn: Malnovulo kiu gajnas la 1<sup>an</sup> premion

Divenis la 25<sup>an</sup>, 26<sup>an</sup>, 27<sup>an</sup>, 28<sup>an</sup>, 29<sup>an</sup>, 30<sup>an</sup>, 31<sup>an</sup>, 32<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: Warden

Divenis la 24<sup>an</sup>, 25<sup>an</sup>, 26<sup>an</sup>, 28<sup>an</sup>, 29<sup>an</sup>, 30<sup>an</sup>, 31<sup>an</sup>, 32<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: Karulino

Divenis la 24<sup>an</sup>, 25<sup>an</sup>, 28<sup>an</sup>, 30<sup>an</sup>, 31<sup>an</sup>, 32<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: Wieslander

Divenis la 24<sup>an</sup>, 25<sup>an</sup>, 27<sup>an</sup>, 28<sup>an</sup>, 30<sup>an</sup>, 31<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: F<sup>no</sup> Allin

Divenis la 30<sup>an</sup>, 31<sup>an</sup>, 32<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: Barbaroux — Y. Joulin —

Kotinju — Bacquet.

Divenis la 31<sup>an</sup>, 32<sup>an</sup>, 33<sup>an</sup>: Aĉjo

Divenis la 28<sup>an</sup>: Renaud

1<sup>a</sup> premio Malnovulo: 1 jaro de *Esperantisten kaj*

*Progresado de la Pilgrimanto*.

2<sup>a</sup> — Karulino: 1 jaro de *Esperantisten*.

3<sup>a</sup> — Warden: 3 monatoj de *Germana Esperantisto* kaj 6 monatoj de *Esperantisten*.

4<sup>a</sup> — S<sup>no</sup> C. Wieslander: 3 monatoj de *Japana Esperantisto* kaj 3 monatoj de *Germana Esperantisto*.

5<sup>a</sup> — F<sup>no</sup> Allin: 3 monatoj de *Ĉasopis Ĉeskij Esperantistu*.

Mi lotmontris la nomojn por divenintoj de sama nombro da

problemoj. *La Gajnintoj sendu senpere 25 al nia administracio*

*kun siaj nomo kaj adreso, rememorigante pri la n<sup>o</sup> de la premio.*

« Malnovulo » aldonu 50 cm. anstataŭ 25. Fine oni aldonu 25 c.

(10 c. por Francujo), se oni deziras rekomendigi la sendaĵon.

*Rimarko:* La solvoj de la problemoj (de la 1<sup>a</sup> ĝis la 6<sup>a</sup>) estos

akceptataj ĝis la 1<sup>a</sup> de Januaro. Nur tiujn solvojn aŭ proponatajn problemojn, oni sendu senpere al

CH. BRUNET 59, Cours Victor-Hugo, Bordeaux (France).



## Premio al niaj gelegantoj.

Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transport-kosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrade por sinjoroj).

La poŝhorloĝo estas plene **garantiata**, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Por **SINJOROJ**: Unika kvalito, supera, 30 fr. = 12 Sm. — Por **SINJORINOJ**, kun verdemajlita stelo: Ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.

# GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

## GELLE FRÈRES

Parfumistoj

PARIS

La firmo korespondas Esperante.

Al samideanoj en la tuta mondo.

### GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn. NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo. NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto. NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto  
(Internacia esperantista librejo)  
15, Rue Montmartre  
Paris.

Nova adreso →

## Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Sciencia Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio :

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,  
Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono : 2,75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj).

Unu numero : 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Sciencia Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno (Italujo), *M. Arch*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

## Librairie de l'Esperanto

15, rue Montmartre, Paris

VIDI ĈI SUPREN.

MARKO LIVERITA

### FLOR ESPERANTA

LIKORO DE L'INTERLIGO  
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likoro  
Ĝi meritas do la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE

MARKO LIVERITA

### CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparaĵoj kun kinkono, la **CHABLIS QUINA**, deponas maljunigante, sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. L. GUYOU & J. FÈVRE  
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

## Viskio Esperanto

Registered trade mark      Marque déposée  
N° 270,042.                      N° 13,195  
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŭŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

### Buchanan, Scott & C<sup>o</sup>

GARTHLAND STREET,  
GLASGOW (Skotlando).


Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgou.

## MILKA VELMA NOISETTINE Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGĪ.



## ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo : FRANCUJE. — 11 f 50 la kesto da 2 boteloj  
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo prenita en S<sup>t</sup> Etienne, impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo :  
**J. B. Brunon-Chauvet**  
S<sup>t</sup> Etienne (France).

Skribu LEGEBLE — Rememorigu ĈIAM pri via adreso.

## ESPERANTAJ ORGANAJ.

**Eho Esperantista.** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

**Esperanta Ligilo.** — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — (1,20 Sm.). Ĉe S<sup>o</sup> Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

**Esperanto.** — Duonmonata. Aĉetebla ĉe multaj stacidomoj kaj publikaj jurnalvendejoj en ĉiuj landoj. 3 fr. (1,20 Sm.) 8, Rue Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo).

**Espero Katolika.** — Tuteesperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S<sup>o</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**Laboro.** — Monata bulteno de Tutmonda Labora Societo. Jare 3 fr. (1,20 Sm.), ĉe S<sup>o</sup> Paul Blaise, 4, rue Bourg-Tibourg, Paris.

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. — ĉe Hachette k. K<sup>o</sup>, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

**Socia internacia Revuo.** — Priraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

## Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

### « LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:  
ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,  
Berlin, S. Prinzenstr. 95.

## PROPAGANDAJ ORGANAJ.

**Afrika Esperantisto.** — Senpaga. 4, Rue du Marché, Alger, Algérie. Por afrikaj samideanoj.  
**The American Esperanto Journal.** — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

**Amerika Esperantisto:** 1 dol. (2 Sm.). L'Americana Esperantisto, 1239 Michigan Ave, Chicago.

**Antaŭen Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La Belga Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1<sup>an</sup> de Septembro.

**The British Esperantist.** — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Brazila Revuo Esperantista.** — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro, aŭ ĉe « Tra la Mondo ».

**Časopis Českých Esperantistu.** — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.). Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

**L'Espérantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N<sup>o</sup>: 35 cent. (14 Sd.)

**Esperanto.** — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. (1,60 Sm.). Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV.

**Finna Esperantisto.** — Ilarejo esperantista, Helsinski, Finnlando. 1 fr. 50 (0,60 Sm.) por la 1<sup>a</sup> jaro.

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N<sup>o</sup> 1<sup>a</sup>, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

**La Lumo.** — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n<sup>o</sup> 2299 V. Timovo, Bulgarujo.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.). Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, St Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S<sup>to</sup> « Espero ».

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEM AJ ORGANAJ.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**Le Cycliste.** — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D<sup>ro</sup>: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. (1 Sm.) Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun mekanismo por ŝangi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

**De Lusthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belglando.

**La plume Sténographique de France.** — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>ro</sup>: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigie, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

## BULONJA KAJ GENEVA KONGRESOJ.

6 numeroj de « Tra la Mondo »: 49 Ilustraĵoj.

Ili formas, kun la raporto pri la Tria, senkompareblan ilustritan kolekton pri niaj kongresoj.

3 fr. (1,20 Sm.) senpere ĉe nia administracio.

## UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. . . . . 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ 5, akireblaj nur senpere, kolektoj nekompletaj:

1<sup>e</sup> mankas la Aprila N<sup>o</sup>. . . . . 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2<sup>e</sup> mankas la Aprila kaj Maja N<sup>o</sup>. . . . . 2,40 Sm.

## DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. . . . . 3,20 Sm.

Binditaj kolektoj.

Dua Jaro, afrankite . . . . . 4,5 Sm.

**Tous les Sports.** — Oficiala Gazeto de l'Unuigantaro de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj (100,000 anoj) D<sup>ro</sup> Raoul Fabens, 29, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandaj kunlaborantoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Alil. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr.; Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0,15 en francaj stacidomoj. Petu spec (1 fr. = 0,40 Sm.)

**LA PLUS LOGIQUE** des Méthodes appliquée à  
**LA PLUS SIMPLE** des langues suivant  
**LES PLUS MODERNES** des principes d'enseignement des langues.

### Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.).  
Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50  
**VERVIERS, Place Verte, 20.**

## LINGVO INTERNACIA

**CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ**

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

**LITERATURA ALDONO:** 16 paĝoj.

**JARA ABONO:** 7 fr. 50 (3 sm.)

**ADMINISTRACIO:**

**Preso Esperantista Societo,**  
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj  
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

**Administracio: Preso Esperantista Societo,**  
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj **DEBERNY** kaj K<sup>o</sup>

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Presliteroj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj **ESPERANTO**. La fandejo DEBERNY kaj K<sup>o</sup> sendos, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por **ESPERANTO**.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.  
A. J. WITERYCK, Presisto, Bruĝo.